KK p. 21; NK p. 24; SH-R p. 27; Pioniro 1969:6, p. 7; 1970:8, p. 8; ĉi-libre p. 33.
Jaj, de nagyon régen volt/Pasis, ĉu revenos tempo la bela?
KK p. 23; NK p.23.
Jaj de szépen muzsikálnak/Sub fenestroj kantoj sonas...
KK p. 15; NK p.35.
Juhászlegény, szegény juhászlegény/Hej ŝafisto, hej ŝafist' senhava/Marĉando...[71]
KK p. 6; NK p. 29; GEMOJ p. 7; KHS p. 22; HA/1, p. 68; Revuo de l' Mondo1938:1, p. 3; VV 1957:11-12, p. 7; Bulteno (HEK), 1958:5-6, p. 118; LkA p. 101.
Káka tövén költ a ruca/Kovas en kanej' ansero...
KK p. 39; NK p. 26.
Katonának nem jó lenni/Soldatvivo malfeliĉa
KK p. 33.
Kerek ez a zsemlye/Landon al la lando...
KK p. 46; NK p. 37; KHS p. 25; HE 1961:9, p. 17; Pioniro 1969:6, p. 8.
Kékvirág, ibolya/La viol', blua flor'...'
KK p. 41.
Két szeretőm volt énnékem/Mi en la vilaĝ du amatinojn havis...
KK p. 45; HE 1920:3, p. 1.
Kint lakom én Kisperjésen/Loĝas mi en step' ekstere
KK p. 14.

Kiskertemben igaz-e babám/En ĝardeno, kara trezoret'.../ĉu ne kolombet'...
NK p. 11; HV 1968:3, p. 20.
Kiskertemben kinyílott a gyöngyvirág/La konvalo ekburĝonis en ĝarden'...
NK p. 31; HV 1968:3, 20.
Kis kutya, nagy kutya nem ugat hiába/Bojas jam ĉiu hund' sur la strat' la famon...
KK p. 28; NK p. 15.
Kis lak áll a nagy Duna mentében/El malproksimo/Eta domo ĉe Danubo granda.(72)
HE 1922:11-12, p. 6; KHS p. 23; VV 1958:1, p. 7; 1958:4, p. 19; LkA p. 21-22.
Kitették a holttestet az udvarra/Oni metis jam la ĉerkon al la kort'...
KK p. 34; NK p. 35.
Lányok, lányok a faluban/En vilaĝo aŭdu ĉiu knabinet'...
KK p. 24; NK p. 20.
Látod-e babám/Vidu amata, vidu...
KHS p. 25.
Látod, édesanyám/Vidu mia patrin'... (Kun muziknotoj).
HE 1972:6-7, p. 31.
Lefelé folyik a Tisza/La river' malsupren fluas
KK p. 41.
Legénycsúfoló/Fraŭlmokado...
HFM 1962:2, p. 28; vd p. 134.
Lehullott a rezgőnyárfa/Jam la foliar' arĝenta de l' tremoloj falas nun...
KK p. 9; NK p. 40; KHS p. 26; HE 1961:7, p. 11; Pioniro 1969:9, p. 8; vd p. 134.
Lovamat kötöttem/Mi ĉevalon ligis...
HV 1968:3, p. 20.
Lyuk, lyuk, lyuk/Tru, tru, tru...
KK p. 7; NK p. 30; SH-R p. 26; HE 1961:7, p. 13; vd p. 134.
Maros vize folyik csöndesen/Riverondoj mole rulas sin...
KK p. 32; NK p.22.
Még azt mondják, Budapesten nincs/Oni diras, vana estas amo-ĉas'...
NK p. 13.
Megjött már a fecskemadár/Alvenis jam la hirundo...
KHS p. 27.
Megrakják a tüzet/Fajron oni metas...
HV 1969:4, p. 20; en: ANDREO CSEH – KIEL EDZPERANTO. Budapest: A. Csiszár 1996. 56 p. (p. 49).
Megyen már a hajnalcsillag lefele/Aŭrstelo hele brilas ĉiele...
HV 1968:3, p. 20.
Miért turbékoltok búgó vadgalambok/Turtoj murmuretaj, kial vi parolas?(73)
KK p. 24.
Miért vagy oly távol, kedvesem?/Ve, kiel vi forestas, ho trezor'?
NK p. 38.
Mi köze hozzája/Batis deke, dekunue, dekdue...
KK p. 35; NK p. 24.
Mikor megyek Románia felé/Kiam iras mi en la militon...
NK p. 35.
Mikor szürkébe öltöztem/Surmetante marŝvestaĵon...
NK p.36.
Nagy a feje, búsúljon a ló/Pendas kapo de ĉevalid'....
KK p. 36; NK p. 23; HE 1961:7, p. 13; vd p. 134.

Nagypénteken mossa holló a fiát/Jen la korvo , idon sian lavas ĝi...
KK p. 42; NK p. 32.
Nem marad a piros rózsa bimbóban/Ruĝa roz' ne longe restas en burĝon'...
NK p. 12.
Nem, nem, nem/Ne, ne, ne...
KK p. 30; NK p. 17.
Nem szoktam, nem szoktam/Je mi ne kutimas...
HV 1968:3, p. 20.
Nem tudom én, mi a bajom/Kio mian koron tuŝis?
NK p. 41.
Nézz rózsám a szemembe/Vidu mian okulon...
KK p. 35.
Ni-ni-ni-ni/Jen, jen, jen, jen...
KK p. 38; NK p. 21.
Nincsen annyi tengercsillag az égen/Tiom stelojn la ĉiel' ne surtenas...
KK p. 34; NK p. 25; vd p. 134.
Nincsen igaz tavasz/Ja printemp' ne estas...
KK p. 41.
Nyisd ki babám az ajtót/Hej, malfermu, mia kar'...
KK p. 25; NK p. 14; KHS p. 30.
Őszi rózsa, fehér őszi rózsa/Roz' aŭtuna, se mi vin rigardas...
KK p. 46; NK p. 26; KHS p. 30.
Pesten csináltattam házat/Domon faris mi ŝtonmure...
NK p. 31.
Piros alma csüng az ágon/Ruĝa pom' de branĉo pendas..
KK p. 14; NK p. 35.
Piros bársony süvegem/Mia ĉapo el velur'...
KK p. 29; NK p. 16.
Piros bort ittam az este/Pro l' vespera vino ruĝa...
KK p. 44.
Piros, piros, piros/Ruĝa, ruĝa, ruĝa...
NK p. 16; vd p. 134.
Putriban lakik a Sári/Loĝas la kara tre fore...
KK p. 29; NK p. 15.
Ritka búza, ritka árpa, ritka rozs/Blua floro, de l' cejan'...
KK p. 20; NK p. 19.
Rózsabokor a domboldalon/Rozujeto sur la montdekliv'(74)
LkA p. 166.
Rózsabokorban jöttem a világra/En rozujo mi naskiĝis matene...
KK p. 7; NK p. 28; HE 1961:7, p. 12; vd p. 134.
Röpdös a pillangó/De la flor' al floro flirtas papilio...
KK p. 37.
Söprik a pápai utcát/Tra la stratoj tra la stratoj...
KK p. 5; NK p. 27; KHS p. 32; VV 1957:11-12, p. 7; ELL p. 231-232; Bulteno (HEK), 1958:4, p. 88; vd p. 134.
Sudármagas, sudármagas/Altan pinton, altan pinton...
NK p. 41; HV 1968:3, p. 20.
Sűrű csillagos az ég/La arbaron iris mi...
KK p. 15; NK p. 36.

Sűrű csillag ritkán ragyog az égen/Etaj steloj dense brilas vespere...
KK p. 6; NK p. 29; HE 1961:7, p. 12-13; vd p. 134.
Szállj el, szállj el, hétpettyes katicabogárka/Flugu, flugu kokcinel'...
KK p. 36; NK p. 21.
Szeged felől beborult/Nigraj nuboj peze pendas sur ĉiel'
KK p. 40.
Szép asszonynak kurizálok/Belulinon mi kortumas...
KK p. 43; NK p. 25.
Szerelmes a nap a holdba/Plenan lunon amas suno
KK p. 29; NK p. 15.
Szeretem a madárkát/Amas tre la birdon mi...
KK p. 40.
Szól a kakas már/Koko krias jam...
KHS p. 34; TK p. 73; vd p. 134.
Tele van a város akácfavirággal/Plena estas urb' je akacia flor'...(75)
KK p. 23; NK p. 18; KHS p. 32.
Temetésre szól az ének/Sonas kanto de sepulto(76)
LkA p. 24; HdE 1971:9, (1508), p. 3.
Temetőben láttalak meg/En tombej' mi vin ekkonis...
KK p. 40.
Te vagy legény/Hej kurucamik'...
GEMOJ p. 6; KHS p. 36; HSkPK p. 35; HV 1976:5, p. 7.
Túlsó soron esik az eső/Transe pluvas, estas granda kot'...
KK p. 43; NK p. 30.
Turi vásár sátor nélkül/Ĉe l' ĉapelo mia: floro...
KK p. 31.
Udvarom, udvarom/Korto, mia korto...
KK p. 37; NK p. 22.
Új sír van a temetőben/En tombejo nova tombo...
KK p. 16.
Van nekem egy imakönyvem/Mi preĝlibron nigran havas...
KK p. 14.
Végigmentem az ormódi temetőn/Mi vagadis apud la tombeja mur'...
KK p. 16.
Vékony deszka kerítés/Tra l' barilo de ĝarden'...
KK p. 31; NK p.18.
Volt neki, lesz neki/Havis li, havos li...
KK p. 27; NK p.14.
Volt szeretőm tizenhárom/Amatinoj, amatinoj dektri estis...
KK p. 7; NK p. 30; HE 1961:7, p. 13.
Zöldleveles diófa/Alta kverk' kun verdfoli'...
KK p. 35.
Zöldre van a, zöldre van a rácsos kapu festve/Hele brilas nia stelo kun verda koloro...
KK p. 21; NK p. 24; KHS p. 35.

***

Popolaj baladoj kaj romancoj

Anjo Molnár
HA/1, p. 27; HA/2, p. 13-15.
Ilona Budai
Esperanto 1920:1, p. 8; HA/1, p. 33-34, HA/2, p. 15-16.
Ilnjo, bela floro
HA/1, p. 36-37.
István Fogarasi
LM 1924/61; HA/1, p. 32; HV 1982:6, p. 207.
Katrinjo Kádár
HV 1974:2, p. 9.
La bela Antal
HA/1, p. 34-35.
Megöltek egy legényt/La murdita fraŭlo
KK p. 18; HV 1974:2, p. 9.
La serpento
HA/1, p. 36.
La soldato kaptita
HA/1, p. 28-29.
Malkuraĝulo
E-P 1921:11, p. 173; HA/1, p. 37; ESk 1951:16, p. 12.
Masonisto Kelemen
HA/1, p. 25-26; HA/2, p. 12-13; HV 1986:5, p. 168.
Máté biró/Juĝisto Máté
HA/1, p. 29-31.

***

(63, 64, 65, 66) Poemoj de S. Petőfi.
(67) Poemo de M. Csokonai Vitéz.
(68) Poemo de S. Petőfi.
(69) Poemo de S. Endrődi.
(70) Poemo de M. Vörösmarty.
(71, 72) Poemoj de S. Petőfi.
(73) Poemo de M. Szabolcska.
(74) Poemo de S. Petőfi.
(75) Poemo de M. Szabolcska.
(76) Poemo de S. Petőfi.

8.4 KANTANTA KAMPARO(77)

101 Hungaraj popolkantoj.
Tradukis K. Kalocsay.

Szeged: Petro Turzó, 1922.
16 x 12 cm, 45 p. Broŝ.

Sonas kantsonoro
Ĝermis kiel floro
Apud kampa voj':
Ĝojo kaj malĝoj',
Larmo kaj petolo
de l' hungarpopolo.

Tiuj versoj bone karakterizas la popolkanton, tiun ampleksan branĉon de la popolpoezio. La kanton kolektis la tradukanto mem.

"Jam de longe estis plendo dum ekskursoj kaj festoj – skribas Kalocsay antaŭparole – *ke oni havas preskaŭ nenion por kanti. Por fari ĉi tiujn kunvenojn pli gajaj, jen mi servas per malgranda bukedo kunmetita el hungaraj sovaĝfloroj."*

Jen floro el la bukedo:

Je ĵaŭdo vespere
Staris mi ekstere.
Falis neĝo, blovis vent',
Pordon ŝlosis vi sen sent'.
Ve, ho ve, mi kiel frostis!

La plendo de la fraŭlo kontraŭ la "senkora" virino efikas ankaŭ sia belega muziko.

*

La suba kanto, kun la orelkaresaj melodioj, fariĝis tiel populara, ke ĝia aŭtoro – poeto Sándor Endrődi – estas jam preskaŭ forgesita.



Falis la gracia
Branĉo de l' violo.
Kor' malĝoja mia
Estas sen konsolo.
Muĝas vento veokria...
Ho adiaŭ, kara mia!

"La tradukoj estas plejparte laŭvortaj – skribas Kalocsay – *kelkfoje tamen ŝajnis al mi necese fari malgrandajn ŝanĝojn en la teksto, kaj kelkfoje eĉ ĉar la tekstoj estas netradukeblaj aŭ seninteresaj, mi verkis tekston tute novan. Oni tuj rimarkis ilin, ĉar ili havas, pli aŭ malpli, Esperantan odoron."*

Jen unu el la ŝanĝitaj kantoj:

Kiel alta, kiel alta estas tiu grandhotel',
Ĉu enestas, ĉu enestas kamarad' kun verda stel'.
Se ne estas kamarad' kun verda stel',
Renverŝiĝu tiu alta grandhotel'.

La kantareto estis bone akceptita ankaŭ eksterlande. La japanoj mendis el ĝi 250 ekzemplerojn.

La floroj de la hungara popolpoezio – skribis tiutempe iu hungarlingva gazeto – *odoras jam ne nur por ni, sed pere de Esperanto ankaŭ al la gefiloj de aliaj nacioj.*

(77) La kantoj estas listigitaj en la ĉap. 8.3.1

8.4.1 Bibliografio

(ABO): *Kantanta Kamparo.*
HE 1923:febr. p. 4.
Király, L.: *Kantanta Kamparo.*
Reggeli Hirlap (Matena Gazeto) Miskolc. 1928.08.02.
En la 1-a vol. p. 58, 128.
Ĉi-libre p. 1, 34.



8.5 NI KANTU![78]

Kolekto de 108 hungaraj popol- kaj laboristaj kantoj.

Budapest: Librovendejo de Hungaria Esperantista Societo Laborista.
15 x 12 cm, 62 p. Broŝ.

Muĝu la kant' kiel ventega ond',
Murojn sieĝu de l' malnova mond'.
Ĝia tondrado nian forton diru.
Luktu, popol', kaj venke antaŭiru!

(Devizo de la Kanto-Societo)

La kolekto estas esence reeldono de KANTANTA KAMPARO ampleksigita per ses originalaj Esperanto-kantoj kaj dek ses laboristaj kantoj. En la Antaŭparolo skribas V. Bleier, la vartinto kaj respondeca eldonanto de la libreto:

"En la kantado manifestiĝas optimista aklamo de la homa koro, sopiranta jen al konsolo, jen al belo kaj noblo..."

La kantojn plejparte esperantigis K. Kalocsay, sed la libro ne mencias lian nomon. La prisilento ne estis senkaŭza. La iom pli postaj okazintaĵoj pravigis la motivojn de la anonimeco. La polico konfiskis la libron, ĉar inter la kantoj troviĝis kelkaj – ekzemple la *Se hejmen post batal'* – kiuj, laŭ la tiama registaro, agitas kontraŭ la reganta sociordo. Pri la konsekvenco – krom la samtempuloj – parolas ankaŭ skribaj pruvoj.

La socialdemokrata taga gazeto Népszava (Popolvoĉo) la 12-an de aprilo 1930 komunikas:

Arestopuno
Pro Esperantaj poemoj
Tradukoj de laboristaj kantoj kiel kontraŭklasa agitado

La *Hungarlanda Esperantista Societo Laborista*, en eldono de kamarado Vilmos Bleier aperigis poemlibron en Esperanto. En tiu kolekto li publikis inter aliaj la tradukon de poemo, kiu sub titolo *"Laborista Marseljezo"* aperis hungare en la libro de Árpád Szakasits[79] sub la kolektiva titolo "HARCOS ÉNEKEK" (Batalemaj kantoj). Pro du poemoj la prokuroro akuzis kamaradon Bleier pri kontraŭklasa agitado. La *Budapeŝta Kriminala Tribunalo* siatempe deklaris absolvan juĝon en la afero, konstatante, ke V. Bleier ne faris agitadon. Pro apelacio de la prokuroro la afero alvenis al la duainstanca tribunalo, kie oni aliigis la unuainstancan juĝon kaj oni kondamnis kamaradon Bleier al unumonata prizonopuno.

*

V. Bleier apelaciis kontraŭ la verdikto, sed ĝi estis senrezulta.

Dum la proceso tuj evidentiĝis, ke la prokuroro furiozis ĉefe kontraŭ la tradukisto kaj volis ekscii ties nomon, sed la konfesigo de Bleier fiaskis. Li ne malkaŝis la tradukanton Kalocsay, kiu en tiu tempo estis grave malsana kaj la antaŭvidebla enkarcerigo estintus mortdanĝera por li, eĉ se ne paroli pri lia medicinista kariero. Vilmos Bleier prenis sur sin ankaŭ la "pekon" de Kalocsay kaj suferis unu monatan prizonan punon.

Pro la sinofero estu omaĝo al la memoro de Vilmos Bleier.

*

Jen kantotitoloj de la libreto, ne listigitaj en la ĉapitro 8.3.1

Originalaj Esperanto kantoj

Barkarolo
Esperanto Himno
Devizo de la ĥoro HESL
Kanteto
Nova sento

Laboristaj kantoj

Socialista marŝkanto
La proletoj
Antaŭen, homoj de l' labor'!
La kanto de l' laboro
Maja Himno
Liberkanto
Se hejmen post batal'...
Flagdisfaldo
Ne murdu!
Laborista Kanto
Laborista Marŝo
Fratoj, al sun'!
Kanto
Popol'! Titan'!
Dubinuska
Laborista Marseljezo

***

8.5.0 Persekutita poezio

(Eltiraĵo el la kriminala proceso kontraŭ Vilmos Bleier pro la eldono de NI KANTU!)

La *Reĝa Juĝtablo de Budapest* kasacias la juĝon de la unuainstanca tribunalo laŭ la 1. c. punkto de § 385. de la *Kriminala Procedura Kodo* kaj konstatas la kulpecon de la akuzato.

La akuzato ekscitis socian tavolon konfesantan sin "proletaroj" kontraŭ la socia tavolo de kapitalistoj per la preso de la poemo *Se hejmen post batal'* publikigita sur la 48-a paĝo de la poemaro NI KANTU!, skribita de nekonata aŭtoro kaj tradukita el la hungara al la Esperanta lingvo, eldonita de la *Librovendejo de Hungaria* Esperantista Societo Laborista – *kiun* reprezentas la akuzato kiel responsa eldoninto – kaj envendejigita la 20-an kaj la sekvantajn tagojn de julio 1928.

Motivoj: La disponanta parto de la juĝo entenas laŭvorte la tradukon de la poemo *Se hejmen post batal'*. Alia traduko el la hungara estas titolita *Laborista Marseljezo,* sed ĉi-poemo estas nur laŭtitole kanto de laboristoj, laŭ enhavo ĝi esprimas la laŭtan vekrion de ne nur la laborista klaso, sed la tuta popolo despere pro malsato kaj mankhavo. Ĝi respondecigas pro la mizero kaj paŭperismo de la popolo la kapitalistojn.

La poemo *Se hejmen post batal'* konfrontas la mizeron de la laboristaro – nomata "proleta klaso"– kun la riĉeco kaj senzorga lukso de la kapitalista klaso. La laboriston hejmenvenintan de la laboro atendas mizero, ŝmuco kaj infanoj plorantaj por pano, kaj dume la kapitalistoj ĝuas en feliĉa nenifaro la ĝojojn de riĉeco en iliaj palacoj. Ĉi-stato estas netolerebla. La laboristaro ne hezitu, sed ekataku la kapitalistojn per pugno, martelo kaj armiloj, ekstermu ilin de sur la tero kaj akiru la regadon super la mondo. Do ĉi-poemo instigas la klason de laboristoj al bato kontraŭ la kapitalistoj, eĉ al tio, ke ĝi efektivigu sian ekskluzivan regadon perforte, per renverso de la nuna sociordo.

Tiuj faktoj respondas al krimo de ekscito kontraŭ la 2-a alineo de § 172. de la *Kriminala Kodo* kvalifikenda kaj punenda laŭ § 19. de artikolo LXIII: 1912. kaj al la delikto de ekscito laŭ la 1-a, eventuale 2-a alineoj de § 5. de leĝartikolo III: 1921.

La supran juĝon konfirmas la *Hungara Reĝa Kurio* jene:

La duainstanca tribunalo ne eraris, kiam ĝi konstatis la kulpecon de la akuzato.

Elhungarigis D-ro Ladislao DUBRAVSZKY
Budapest, 1978.

(78) Listigitaj en la ĉap. 8.3.1 escepte la originalajn E-kantojn kaj laboristajn kantojn.
(79) Post la dua mondmilito (1945) li plenumis altrangajn ŝtatajn oficojn: parlamentano, vicĉefministro, prezidento de la *Hungara Popolrespubliko.*

8.5.1 Bibliografio

Bodó, K.: *Ni kantu!*
HH 1928:7, p. 109.
Népszava (Popolvoĉo) 1930.O4.12.
Markovits, Gy.: En: ÜLDÖZÖTT KÖLTÉSZET. (Persekutita poezio).
Budapest: Eldonejo de Akademio, 1964.
Tárkony, L.: En: *Kolomano Kalocsay.*
NP 1966:3, p. 137.
Poznania Esperantisto 1972:aŭgusto-septembro; repr. en: HE 1973:1, p. 9.
EM 1975:1, p. 6.
Csiszár, A.: En: *Kalocsay Kálmán.*
VNY 1981:5, p. 6.
Barna, Z.: En: LA LABORISTA ESPERANTO-MOVADO EN HUNGARIO.
Budapest: HEA 1987. 183 p. (p. 78).
Csiszár, A.: En: *Kompletigo al la "Kompletigo".*
Fonto 1992:141, p. 26.
Csiszár, A.: En: SENVUALE (Pri la pseŭdonimoj de K. Kalocsay).
Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro 1999. 25 p. (p. 5-7)
En la 1-a vol. p. 57, 58, 128.



8.6 Sándor Petőfi: JOHANO LA BRAVA

Poemfabelo en versoj.
El la hungara originalo tradukis
K. de Kalocsay.

Kun kolora reprodukcio de la pentraĵo de
Álmos Jaschik.
Budapest: Literatura Mondo 1923.
14 x 11 cm, 87 p.

Dua, reviziita eldono kun antaŭparolo de
K. Kalocsay. Sen ilustraĵoj.
Budapest: Literatura Mondo 1948.
17 x 11 cm, 65 p.

Tria eldono en la volumo LIBERO kaj
AMO.
Budapest: Corvina 1970.
19 x 11 cm, 260 p.



Kvara eldono kun postparolo de Vilmos
Benczik.
Titolpaĝa desegnaĵo de Ádám Würz.
Budapest: HEA 1984.
20 x 14 cm, 60 p.

En bildrakonta formo, laŭ la freskoj de
Béla Sándor.
Kun koneksaj strofoj de K. Kalocsay.
Kunliga teksto, Prologo kaj Epilogo de
Ada Csiszár.

Budapest: KAL-ĈI DOKUMENTARO,
1997. Kun 12 koloraj bildoj.
22 x 15 cm, 37 p.

En paralelaj Esperanta kaj ĉina tekstoj.
Reĉinigis Li Naixi laŭ la reviizita traduko de
K. Kalocsay.
Hubei-a Esperanto-Asocio, 1997.
20 x 14 cm, 64 p. Broŝ. Kun nigra-blankaj
bildoj.

En 1923, okaze de la centjara naskiĝdatreveno de Sándor Petőfi, *Literatura Mondo* eldonis la naivan epopeeton: JOHANO LA BRAVA, en traduko de Kalocsay.

"La traduko estas la kompromisoj – skribis Kalocsay en *Rimarkoj. – Granda ĉagreno estas vidi kelkfoje, ke belecoj neeviteble glitas for el la mano. Eble tamen mi sukcesis iom konservi la naivan simplecon, kiu estas la plej granda ĉarmo de la originalo..."*

Vere la poemfabelo de Petőfi, verkita en popola lingvaĵo, ne estas facile interpretebla. Tamen ĉe la Esperanta transplanto perdiĝis malmulto el la valoro de la originalo.

Por fidele redoni la hungaran pensmanieron, la iom strangan specialan mondon de la popolfantazio, en la traduko Kalocsay ne povis eviti uzadon de neologismoj. Pri la neoficialigitaj vortoj kaj pri kelkaj necesaj klarigoj bone prizorgis la tradukanto. La *Akademio* premiis la majstran tradukon de Kalocsay.

La reviziita traduko reaperis en 1948. En la *Antaŭparolo* skribas Kalocsay:

"Granda ĝojo estas por mi la dua eldono de tiu ĉi libro: ĝi pruvas, ke jen, ankaŭ poezia verko povas havi en Esperantujo legeman publikon... Traleginte mian malnovan tradukon, mi vidis, ke mi ne povas ĝin lasi sen intensa tralaboro. Ĝi estis mia unua pli granda verstraduko, farita sur nivelo, kiun mi kredas, jam superpasis ne nur mi, sed ankaŭ nia poezia lingvo. En la nuna formo la verketo certe havas lingvaĵon pli naturan, ritmon pli fluan, rimadon pli varian..."

La traduko represigis triafoje en la kolekto de elektitaj poemoj de Petőfi: LIBERO kaj AMO (1970). La kvara eldono venis en 1984.

JOHANO LA BRAVA en 1931 aperis ankaŭ en ĉina vesto. La eminenta tradukartisto Sun Yong ĉinigis ĝin. Sun Yong, kieŝ merito estas – krom la interpreto de Petőfi-poemoj – ankaŭ aliaj tradukoj el la hungara literaturo (parta pere de Esperanto), en 1958 ricevis distingon de la *Hungara Popolrespubliko: Ordeno de l' Laboro.*

La epopeo aperis ankaŭ kiel bildrakonto. Pli ol dudek jarojn dormis en la KAL-ĈI DOKUMENTARO dekdu koloraj bildoj – laŭ la artaj freskoj de Béla Sándor – kiuj kun la koneksaj versoj de Kalocsay prezentas mozaikojn el la aventuroj de la heroo. De sceno al sceno kompletigas la rakonton proza teksto de A. Csiszár. Fotografaĵo de Petőfi kaj kantoteksto kun muziknotoj riĉigas la elegantan albumon pretigitan en kelkaj ekzempleroj destinitaj por la plej signifaj Esperanto-bibliotekoj.

SÁNDOR PETŐFI

JOHANO LA BRAVA

BILDRAKONTO

Budapest, 1997

Skiza rakonto de la fabelo:

La heroo de la rakonto Janĉi[80] estas infano trovita. La edzino de iu farmulo trovis lin sur maizkampo, tial la knabeto ricevis kiel familian nomon: Kukorica (t.e. maizo) La bonkora virino – malgraŭ la protesto de la edzo – decidis eduki la infanon. La virino baldaŭ mortis kaj de tiu tempo Janĉi ofte spertis la duran manon de la kruela mastro. Kiam Janĉi atingis la junaĝon, li fariĝis ŝafpaŝtisto kaj gardadis la gregon de la farmulo.

En la sama vilaĝo vivis malriĉa geedza paro kun filineto Ilnjo[81]. Ankaŭ tiun ĉi knabinon ne dorlotis la sorto. Post la frua morto de la patrino, la patro reedziĝis. Kiam ankaŭ la patro mortis, Ilnjo manĝis la amaran panon de orfoj. La ŝtonkora stifpatrino troŝarĝis la knabineton per laboroj kaj domaĝis de ŝi eĉ la panpeceton.

La du kompatindaj orfoj enamiĝis. Ilnjo ne povis kontraŭstari al la dolĉparola allogo de Janĉi. Foje dum arda kisado rapidis la tempo. La geamantoj ne rimarkis, ke la suno subiris kaj ekbriletis la steloj. El la fea amsonĝo vekis ilin minaca kriaĉado de la stifpatrino. Nur la kuraĝo de Janĉi povis bridi la furion kaj defendi la tremantan knabinon de sovaĝa batado.

Malfeliĉo malofte venas sola

Dum la kisado diskuris la grego. La kompatinda Janĉi retrovis nur la duonon de la ŝafaro. Kiam li hejmengvidis la restaĵon, la farmulo preskaŭ freneziĝis pro la kolero. Li kaptis forkegon por mortpiki la "kanajlon". Janĉi forkuris de la mensperdita mastro, sed li sciis, ke li devos fuĝi ankaŭ el la vilaĝo kaj trovi vivrimedon aliloke.

Li ekiris. Lace kaj malsate li alvenis en obskuran arbaron, en kies mezo lumis fenestro de kabano. Ĝojis Janĉi, supozante, ke li trovis gastejon, kie li ricevos manĝaĵon kaj noktan ripozejon. Li trompiĝis, ĉar anstataŭ drinkejo li enpaŝis en kaŝlokon de rabista bando. La rabistoj volis murdi Janĉin, sed ties kuraĝo ne sinkis en la krurojn. Li ŝajne aliĝis al la bando kaj dum trinkado artifike ebriiĝis kaj brulmortigis la krimulojn.

Dum la migrado li renkontis husaran[82] taĉmenton marŝantan por helpi al la francoj venki la turkojn. La belaj husaroj tre plaĉis al Janĉi. Li aliĝis al la trupo. La taĉmento forlasis Hungarujon. Ĝi transiris Tatar-landon, Italion, Polujon, Hindujon. La bravuloj dum la marŝado travivis strangajn aventurojn. La trupo fine alvenis Francujon, kie la turkoj rabis, ruinigis kaj murdadis. Ili forrabis ankaŭ la filinon de la franca reĝo.

La bravaj hungaroj venkis la turkojn. Janĉi mortigis la grandventran estron de la turka hordo kaj savis la reĝidinon el la brakoj de la paŝa-filo. Li hejmengvidis la reĝidinon al la patro. En la palaco estis granda ĝojo, festeno kaj festo. La dankema reĝo proponis al la filin-savinto la manon de la reĝidino kune kun la trono. La reĝidino estis belega, kaj en la vejno de Janĉi fluis sango ne selekto. Do granda estis la tento.

Tamen Janĉi rifuzis ĉion, ĉar en la memoro aperis la kara figuro de Ilnjo. Li rakontis al la reĝo pri sia malfeliĉa vivo kaj pri la kompatinda Ilnjo. La kortuŝita franca reĝo donacis al Janĉi multajn trezorojn kaj nobelan titolon kun la nomo "JOHANO LA BRAVA".

Jen Janĉi fariĝis riĉa nobelulo. Li decidis hejmeniron kaj planis edziĝon al Ilnjo. Kun belaj revoj kaj esperoj li enŝipiĝis.

Homo proponas, Dio disponas

Venis terura uragano kaj rompis la ŝipon je ruboj. La vojaĝantoj ĉiuj pereis, nur saviĝis Johano (kvankam sen sia trezoro) laŭ mirakle: sovaĝa ondego ĵetis lin supren kaj la lerta ŝiprompulo subite kaptis ambaŭmane iun nubon kaj alkroĉigante firme tenis sin ĝis la nubo descendis ĉe marborda roko.

Sur la altega roko nestis grifo. Johano sidiĝis sur la dorson de la giganta birdo, kiu flugigis lin hejmen. Janĉi tie sciiĝis, ke Ilnjo intertempe *transiris en pli belan mondon.*

Kun trista koro iris Johano al la tombo de Ilnjo kaj deŝiris rozon kreskintan el la cindroj de la amatino.

Janĉi ekiris denove en la vastan mondon.

Post longa migrado li alvenis en la *Landon de l' Gigantoj*. Kun artifiko kaj kuraĝo Janĉi dishakis la gorĝon de la gigant-gardisto kaj enpaŝis en la palacon de gigant-reĝo, kiu kun siaj korteganoj ĝuste vespermanĝis. Ili manĝis buleton kaj malice invitis Johanon por vespermanĝi. Sed ho, la buleto pretiĝis ne pasto, sed el ŝtono. Johano la ŝtonbuleton ĵetis al la reĝo kaj trafis ĝuste lian kapon. La gigant-reĝo tuj mortis. Tiam la timiĝintaj subuluj petegis mizerikordon kaj volis elekti Johanon reĝo.

Johano rifuzis la honorigon, sed postulis fidelecon de ili. La gigantoj transdonis al li fajfilon sorĉan: ie ajn kaj iam ajn al la fajfa voĉo aperas gigantoj por servi al la fajfanto.

Johano forlasis *Gigantion.*

Baldaŭ li atingis la *Landon de Mallumo* kie sur la ĉielo nek suno, nek luno, nek stelaro brilis. Li povis iri nur palpe. Tiu lando estis la lando de sorĉistoj. Al la fajfsignalo de Johano aperis gigantoj kaj laŭ ordono de Janĉi ili ekstermis ĉiujn sorĉistinojn, el inter ili la lasta estis la kruela stifpatrino de Ilnjo. Kaj jen la ĉiela obskuro cedis kaj la *Lando de Mallumo* fariĝis hela, plenlume brilis la suno.

Janĉi vagis plu. Kiam subiris la suno, li haltis por ripozi. Li sterniĝis uzante ian fostomonteton kiel kapkusenon. En la mallumo li ne vidis, ke li elektis dormolokon en tombejo. Noktomeze spiritoj klopodis ektimigi la migranton, sed la senespera kaj brava Johano timis jam nenion.

Post longa migrado li alvenis al la bordo de *Fabeloceano.* Li fajfvokis giganton por transiri la maron. Dum la oceana vojaĝo li subite ekvidis teron. Tio estis la vilaĝfino, kie situas *Feolando.*Vana estis la admono de la giganto, Johano scivolis vidi ankaŭ tiun landon, kies pordojn gardis abomenaj monstroj. Ĉe la unua pordo estis ursoj, ĉe la dua leonoj. La brava Janĉi triumfis ĉi-monstrojn, sed sekvis la tria, la lasta pordego gardata de timiga drakserpento. Li murdis ankaŭ la drakserpenton.

Jen estis senbara la vojo en *Feolandon,* kie estas nur ĝojo kaj plezuro. Belegaj gefeoj gvidis lin en la mezon de la fabela insulo. Kiam Johano vidis jam ĉion, kvazaŭ li vekiĝus el sonĝo. Lian koron subite kaptis malespero, ĉar en la memoro aperis la kara, jam mortinta Ilnjo. Li tiel sentis, ke li plu ne povas elteni la doloron, ne povas vivi sen Ilnjo.

En la mezo de *Feolando* brilis belega lago. Johano volis dronigi sin en ĝin, kaj almenaŭ simbole, li volis kuniĝi kun Ilnjo. Li prenis la rozon plukitan de la tombo de Ilnjo kaj ĵetis ĝin en la akvon dirante:

"Cindroj de l' amata! Mia riĉ' unika!
Nun mi vin postiros, estu voj-indika!

Sed miraklo de mirakloj...

Tiu akvo estis mem la vivoputo,
Ĉion revivigas el ĝi sola guto.
Kaj el ŝiaj cindroj kreskis tiu rozo,
do la akvo vekis ŝin el mortripozo.

La rozo aliformiĝis en Ilnjon. Jen la fidelaj geamantoj post longaj suferoj renkontiĝis. La fea gento elektis Johanon reĝo. Kaj de tiam la Reĝa Moŝt' kun Ilnjo vivas feliĉe en la rava *Feolando.*

*

La *Asocio de Hungaraj Blinduloj* en 1983 aperigis Petőfi-volumon en brajla skribo, ene ankaŭ la poemfabelon. La esperantistaj blinduloj senpage faris la brajlan presadon. Inter tiuj oferemaj samideanoj oni decas aparte mencii la nomon de László Orosz, kiu prenis sur sin grandan parton de la laboro. Dum la 68-a UK en 1983 en Budapest la LIBE-anoj ricevis la libron donace.

*

La poemfabelon oni adaptis ankaŭ por Esperanta pupteatro. La transplantigon – utiligante la tradukon de Kalocsay – faris R. Bánky. La *Hungara Ŝtata Pupteatro* prezentis ĝin dum la 68a UK en Budapest. En la *Internacia Pupteatra Festivalo* (en Zagreb) ĝi ricevis kvin diversajn premiojn.

*

La popularecon de la epopeo pliigis, ke la originalo estas transkribita ankaŭ en melodramon, konata de ĉiu Hungaro, sendepende de ilia klereco. La suba kanto el la teatraĵo – laŭ la versa teksto de Jenő Heltai kun la orelkaresaj melodioj de Pongrác Kacsóh – fariĝis popola furor-kanto. El la postlasaĵo de Kalocsay venis sunlumon la Esperanta traduko de la kanto. Ĝi aperis unuan fojon en la menciita bildrakonta adaptaĵo (1997).

DIRAS ĈI ROZ' JA PLI DA BEL'

Diras ĉi roz' ja pli da bel',
ol la plej ama amleter',
la sendantin' ne scias skribi,
ĉar ŝi ja kuŝas sub la ter'.
Kuŝas jam en tombar' silenta,
en okulferma mort-ripoz',
el ŝia polvo kreskis rozo,
ĉi floro, floro, flor' de roz'.

Jen tiu roz' por rememor',
la amo brilas en ĉi flor',
tiel do povas eĉ transtombe,
plu ami la fidela kor'.
Kuŝas jam en tombar' silenta,
en okulferma mortripoz',
sed vivas flore ŝia amo:
ĉi floro, floro, flor' de roz'.



(80) Janĉi estas karesnomo de Johano.
(81) Originale Iluska, karesnomo de Helena.
(82) Hungaraj soldatoj.

8.6.1 Esenca bibliografio

Lengyel, P.: *Johano la brava.*
LM 1923/99-100.
G. S(troele): *Johano la brava.*
Esperanto 1923/181.
Merton, M. M.: □TBE 1948:julio-aŭgusto, (519-520), p. 172-173.
Szilágyi, F.: *Johano la Brava.*
LM 1948/191-192.
Van-sing: *Petőfi Kinában* (Petőfi en Ĉinio).
Népszabadság (Popollibereco) 1959.08.13.
Csiszár, A.: *Johano la brava en bildrakonto.*
LF 1983:79, p. 10.
Bartos, E.: *Johano la brava.*
derE 1985:2, (130). p. 40.
Ragnarsson, B.: *Famega versrakonto.*
HdE 1985:3, (1742), p. 4.
Rossetti, R.: *Johano la brava.*
BrE:1985:septembro-oktobro, (866), p. 79-80.
Shi Chengtai: *Baghy kaj Kalocsay en Ĉinio.*
Penseo 1991:11, p. 2-5; repr. en: Esperanto 1991/138-140.
Szilvási, L.: *Ekskluziva eldono en 5 ekzempleroj.* (Pri la bildrakonto).
Eventoj 1997:2/aprilo, (0121), p. 7.

8.6.1.0 Notoj kaj referencoj

LM 1922/42.
HH 1929:6, B. p. 9. *Johano la Brava sur poŝtkartoj.*
AD p. 183. Kamarýt, St.
Népszabadság (Popollibereco) 1957.06.10. Galla, E.
HV 1968:2, p. 4-5. Kökény, L.
EM 1975: 5, p. 17. Fejes, M.
VNY 1981:5, p. 6. Csiszár, A.
KAJ LA CETER' p. 14. Waringhien, G.
HV 1984:3, p. 86-87.
BI 1985:4, p. 10; 86:11, p. 9, Mihalkov, G.
IF 1989:2, p. 43-49. *La Prefikso...*Vatré, H.
LF 1991:133, p. 14. Csiszár, A.
Hungaraj Paĝoj 1998:februaro, (7). *"Johano la Brava" retradukita kaj eldonita en Ĉinio.*
En la 1-a vol. p. 41, 42, 127.
Ĉi-libre p. 1, 3, 54.


EMERIKO MADÁCH

LA TRAGEDIO DE L' HOMO

DRAMA POEMO

•

KUN DUDEK DESEGNAĴOJ DE MIHAELO ZICHY KAJ KUN LA PORTRETO DE L'AŬTORO

EL LA HUNGARA ORIGINALO

K. KALOCSAY

BUDAPEST

ELDONO DE LA HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO

8.7 Imre Madách: LA TRAGEDIO DE L' HOMO
Drama poemo.
El la hungara originalo tradukis K. Kalocsay.

Kun dudek desegnaĵoj de M. Zichy, kaj kun portreto de l' aŭtoro.
Budapest: Hungara Esperanto Instituto 1924.
24 x 14 cm, 237 + XXIV p. Bind.

Dudek kvin ekzempleroj estas presitaj sur luksa papero, binditaj lede, numerita kaj signitaj per la propramana nomskribo de l' tradukinto.

Dua, tralaborita eldono sen ilustraĵoj.
Enkonduko de I. Sőtér.
Budapest: Corvina 1965.
20 x 14 cm, 259 p. Bind.

Ĉefverko de la hungara literaturo.

La TRAGEDION naskis kriza epoko de la hungara historio. Kvankam pasis jam dek jaroj de la subfalo de la libermilito (1848-1849), kiam Madách verkis la draman poemon, tamen la hungara nacio ankoraŭ ne regajnis sian vivoforton. Sub la premo de "Bach-epoko" la patriotoj falis en letargion, la ĉielo estis morna super Hungario.

Tiun pesimismon spegulas ankaŭ la propra malfeliĉo de Madách. Lia sanstato neniam estis perfekta, dum la liberecbatalo mortis lia frato, oni masakris lian fratinon kun ŝia edzo kaj eta infano. Ankaŭ la geedza vivo de Madách ne estis feliĉa. Li trompiĝis pri la virino, disfalis lia geedza vivo. Tiuj doloraj spertoj, senreviĝoj malheligis lian animan staton kaj tiu montriĝas ankaŭ en la TRAGEDIO, sugestante, ke la blindaj fortoj de la cirkonstancoj determinas la sorton de la homo.

La drama poemo aperis en 1862, kaj ĝian sukceson pruvas, ke post unu jaro jam venis ĝia dua eldono.

La TRAGEDION – kvankam probable Madách ne destinis por podio – oni enscenigis kaj unuafoje estis prezentita en 1883 en la *Nacia Teatro*. La sukcesan surscenigan tagon jam ne ĝisvivis Madách.

En Hungario estas jam kvazaŭ tradicia tasko la prezentado de LA TRAGEDIO DE L' HOMO. Tiu ĉi perlo de la hungara literaturo estas prezentata ankaŭ sur diverslandaj scenejoj.

La tri ĉeffiguroj de la dramo estas Adamo, Eva kaj Lucifero. Adamo estas kreiĝinta por reĝi, Eva estas la natura instinkto kaj Lucifero estas la pura menso.

La TRAGEDIO enhavas 25 bildojn kaj la historio komenciĝas en la Paradizo per tio, ke Adamo konsciiĝas kaj pro tio li forŝiriĝas de la Paradizo kaj de la instinkta vivo.

Eva restas ĉiam en sekreta interligo kun tiu Paradizo kaj de la instinkta vivo.

La puran menson reprezentas Lucifero. Kaj Adamo staras inter tiuj du.

Al la Edena paro Lucifero per sonĝbildoj montras la venontan teruran historion de la homaro. En aro da vizioj Adamo travivas la pereojn de diversaj civilizoj kaj idealoj. Tiuj ĉi vizioj celas komprenigi al Adamo, ke nur li mem povas per sinmortigo neniigi la homon, la dian kreaĵon. Do Adamo devas malesperiĝi kaj morti, eble kuntreni ankaŭ Evan en abismon. Tamen ne tiel okazos. La homa vivinstinkto en la lasta bildo repostulas Adamon de la rando de abismo. Kaj ne estas hazarde, ke tiu vivinstinkto ekparolas per la voĉo de Eva:

Ho, vi certe sereniĝos,
se mi ĝin flustros. Venu do proksimen.
Mi sentas min patrino, ho Adam'.

Kaj Adamo obeas al tiu vivinstinkto kaj li komprenas, ke nur la kredo kaj laboro estas la fonto de la progreso kaj feliĉo, la senco de la homa vivo.

Kaj la drama poemo finiĝas per kuraĝiga akordo flanke de la Disinjoro:

Mi diris, luktu hom', kaj firme fidu!

Tiu ĉi mondfama kreaĵo de Madách – laŭ nia scio – havas tradukojn en dudek sep lingvoj. Koncerne la transplanton al Esperanto jam antaŭ Kalocsay okazis provoj. En la fruaj jaroj Adolf Altenburger kaj Robert Schatz provis konkeri tiun verkon. Bedaŭrinde mankas indikoj, kie kaj kiom el la tradukoj aperis. Fragmentoj troviĝas en la 8-a jarkolekto de *Verda Standardo*. La tradukinto estis Cezaro (Géza) Bárczi, la elstara hungara lingvisto, akademiano, Kossuth-premiito. La unua fragmento de la dramo aperis en la tempo de la 2-a *Hungara Esperanto-Kongreso* (1913, aŭgusto) kaj unu, la lasta fragmento troviĝas en 1914 en la junia numero de *Verda Standardo*.

La traduko de la TRAGEDIO estas la verko, kiu en 1924 portis al Kalocsay vere grandan sukceson. Kiel li rakontis, dum la traduko ege premis lin skrupulemo, pro la konscio, ke la eventuala fiasko kompromitus ne nur la internacian lingvon kaj la propran renomon, sed antaŭ ĉio la mondfaman klasikan verkon kaj ties kreinton.

"Mi volis doni tradukon fidelan laŭ formo – skribis Kalocsay en la unua eldono – *kaj laŭvorte fidelan laŭ enhavo, konservi ĉiujn nuancojn de la originalo. Krome kaj precipe mi volis eviti ĉiun deflankiĝon de la bona kaj flua proza stilo, lukti kontraŭ tiu danĝero, ke pro la versa formo la frazoj konfuziĝu kaj prezentu enigmojn al la leganto..."*

La fidelon de la tradukaĵo plej kompetente povas juĝi, kiu scias ankaŭ la lingvon de la originala verko. Ĝuste tial taŭgas citi Hungaron, Julio Baghy, kiu recenzante la tradukon (LM 1924/198-199) skribas:

"...La frapanta fideleco al la originalo, la simpla, sed trafa esprimmaniero la poezian ĉarmon konservanta interna forto de la traduko, kiu eĉ nuancojn ne deturnas, tiom surprizis min dum la unuafoja legado, ke reteni la ekkriojn de l' admiro mi ne povis. Mi ja bone konas la originalon, kies Luciferon jam kelkfoje mi estis ludanta sur scenejo, sed mian admiron, sinceran entuziasmon vekis la klereco de la traduko, kiu faras la verkon pli facile komprenebla kelkloke, pli ĝuebla arte ol la originalo mem..."

La TRAGEDION jam ĉe la unua eldono favore akceptis la Esperanta publiko. Kvardek unu jaroj pasis depost la apero de la unua eldono ĝis la dua. Dum tiu tempo riĉiĝis ne nur la lingvo de Esperanto, sed disvolviĝis ankaŭ la talento de Kalocsay, evoluis lia interpretiga kapablo. Li mem rimarkis en la dua eldono:

"... ĉe la trastudo de la malnova traduko mi konstatis, ke ĝi nepre bezonas tralaboron. Kaj nun la leganto ricevas tradukon preskaŭ novan..."

Ĉe la tralaboro Kalocsay sukcesis koncizigi la tekston. La dua teksto estas malpli per 100 versoj ol la antaŭa kaj per nur 40 versoj pli ol la originalo.

Ĉu la ekstera formo? Ambaŭ tradukoj konservis la jamban formon kaj uzis nur tiujn faciligojn, kiujn sankciis jam Zamenhof. Kie la originalo estas rima, tie metis rimon ankaŭ Kalocsay. Laŭ la eminenta hungara literatoro György Radó, la Esperanta traduko de la Tragedio estas la plej sukcesa inter ĉiuj ĝiaj tradukoj.

En ambaŭ tradukoj troviĝas neologismoj, kies uzo estas nepre bezonataj ĉe poezia verko. Tiujn vortojn listigas tabelo. La *Glosaro* en la dua traduko enhavas 58 vortojn, ne troveblajn en la PLENA VORTARO kaj ties SUPLEMENTO. Inter ili estas kelkaj, kiuj ĝis

tiam ne estis registritaj en vortaroj: *ĉipa* (malmultekosta); *elano* (antaŭensvingiĝo); *mava* (malbona) ktp. Tiuj neologismoj kelkfoje elvokis indignojn.

"Mi ne povas subpremi la konjekton – skribis unu el la recenzantoj –, *ke se la verko ĝisvivos sian trian eldonon, Kalocsay surprizos nin per nova nombro de inventaĵoj, kiuj montriĝas "necesaj".*

Tamen tiuj kaj similaj riproĉoj kontraŭ neologismoj, estis jam multe pli mildaj ol en la tridekaj jaroj. Estas fakto, ke la TRAGEDIO – kiel ĝenerale la klasikaj verkoj – ne apartenas al la stoko de t.n. "facilaj legaĵoj", sed tiun malfacilaĵojn ne kaŭzas la uzitaj 58 neologismoj, sed tiu fakto, kiu deziras de la leganto ioman konon de la mondhistorio, socihistorio, religia legendo, ktp. La tradukisto kalkulis tiujn obstaklojn kaj en *Komentaro* de bildo al bildo helpas la legantojn en la kompreno.

La majstroverkon de Madách en la majstra traduko de Kalocsay oni kalkulas jam kiel perlon de la mondliteraturo en vesto de la internacia lingvo.

***

La *Petőfi Literatura Muzeo* kaj *Literatura Centro* (Budapest) aperigis la TRAGEDION sur CD-ROM en 20 lingvoj (en 25 tradukoj), inter ili ankaŭ la Esperantan tradukon de Kalocsay. La disko estis prezentita en la Frankfurta Librofoiro en 1999.

Imre MADÁCH
(1823-1864)

8.7.1 Esenca bibliografio

Jobo (J. Baghy): *La Tragedio de l' Homo.*
LM 1924/198-199.
G. S(troele): *La Tragedio de l' Homo.*
Esperanto 1925/4-5.
Kalocsay, K.: *Imre Madách.*
HV 1964:2, p. 9-12.
Kalocsay, K.: *La Tragedio de l' Homo kaj Imre Madách.*
Prelego en la Grupo Konkordo (Budapest) 1964.ll.23.
Presita en DPr p. 107-110.
Szilágyi, F.: *Reapero de "La Tragedio de l' Homo".*
NP 1964:4, p. 97-98.
G. F. : *"Tragedio de l' Homo".* (Interparolo kun Kalocsay).
Magyar Nemzet (Hungara Nacio) 1964.09.01.
Baghy, J.: *Imre Madách: La Tragedio de l' Homo.*
NB 1965:1, Suplemento, p. V.
Kökény, L.: *La Tragedio de l' Homo.*
HFM 1966:1, p. 14.
Auld, W.: *"La Tragedio de l' Homo" – Ne ordinara travivaĵo.*
Esperanto 1966/70-71.
P. B(alkányi): *Ni salutas la novaperon de La Tragedio de l' Homo.*
Paco 1966:151, (Hungara eldono), p. 37.
Couwenberg, F.: *Ne malaktualiĝas La Tragedio de l' Homo.*
HdE 1966:5, p. 4.
Tárkony, L.: *La nova Tragedio-traduko.*
HV 1966:3, p. 26.
Gergely, M.: *Az Ember Tragédiája eszperantóul* (La Tragedio de l' Homo en Esperanto).
Élet és Irodalom (Vivo kaj Literaturo) 1966.03.12.
Szilágyi, F.: *La Tragedio de l' Homo.*
NP 1966:1, p. 55-56.
G. J. D(egenkamp): *La Tragedio de l' Homo.*
NE 1967:febr., p. 17-18.
Haupenthal, R.: *Hungara majstroverko.*
GER 1967:3, p. 35.
Lapenna, E.: *La Tragedio de l' Homo.*
Kajeroj 1967:14, p. 20.
Szathmári, S.: *La Tragedio de l' Homo.*
HV 1968:3, p.18-19.
Setälä, V.: *La Tragedio de l' Homo – La Eterna lukto.*
EF 1969:1-2, p. 2-5.
Radó, Gy.: *La loko kaj la valoro de la Esperanta teksto en la historio de la tradukoj de "La Tragedio de l' Homo".*
HV 1970:3, p. 8-9.
Nagy, K.: *Komparo de du tradukoj de Kolomano Kalocsay. Imre Madách: "La Tragedio de l' Homo"*
LF 1977:42, p. 12-13.

Nagy, J.:*Komparo de du tradukoj de Kolomano Kalocsay. Imre Madách: "La Tragedio de l' Homo".*
Sciencaj Komunikaĵoj 1977:julio, p. 27-32.
Kökény, L.: *Du tradukoj de "La Tragedio de l' Homo".*
En manuskripto 1977.06.04.
Csiszár, A.: *"La Tragedio de l' Homo" kaj Imre Madách.* (Pri la prelego de K. Kalocsay post dudek jaroj).
LF 1984:83, p. 16.
Fejes, M. *Efektivigo de evolutendencoj de la beletra lingvo – laŭ analiza komparo de tri tradukoj de "La Tragedio de l' Homo".*
Prelego en la 5-a ILF en 1986.
Presita en HV 1987:2, p. 54-57.

8.7.1.0 Notoj kaj referencoj

KONATIĜU p. 12.
HE 1924:5, p. 42. (-k-) (Kalocsay).
PAĜO p. 88. Tárkony, L.
LM 1935/16. Loti, P.
Magyar Nemzet (Hungara Nacio) 1964.07.25. Radó, Gy.
TBE 1966:novembro, (727), p. 434. C. D. A. C.
HE 1967:9, p. 11. *Rimarkoj pri la nova traduko.* Kalocsay, K.
□VALLOMÁSOK A GYÓGYÍTÁSRÓL. (Konfesoj pri la kuracado). Red. S. Székely. Budapest: Medicina Kiadó 1973. (p. 439).
EM 1974:5, p. 2. Auld, W.
Új Szó (Nova Vorto) 1983.10.28. Benicky, É.
IF 1989:2, p. 43-49. *La Prefikso...* Vatré, H.
LF 1991:133, p. 14. Csiszár, A.
En la 1-a vol. p. 22, 24, 42, 43, 128,
Ĉi-libre p. 1, 3, 70.



8.8 HUNGARA ANTOLOGIO(83)

Poemoj kaj noveloj de 51 verkistoj.
Tradukis: K. Kalocsay, J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi, L. Totsche.

Antaŭparolo kaj klarigoj de K. Kalocsay.
Studo pri la hungara literaturo de M. Babits.
Redaktis K. Kalocsay.
Portretoj de 47 verkistoj.

Budapest: Literatura Mondo 1933.
21 x 15 cm, 470 p. Bind. kaj broŝ.

Dua eldono.
Sen ilustraĵoj.
Red. V. Benczik.
Budapest: Corvina 1983.
23 x 16 cm, 448 p. Bind.

Unua libro el el la serio de *Asocio de Esperantaj Libro-Amikoj* (AELA) 1933.

Post la apero de ETERNA BUKEDO (1931), Kalocsay skribis al Ferenc Szilágyi:

"... iom tro multe mi vagadis sur la fremdaj kampoj de latinoj kaj grekoj, de Baudelaire, Dante, Heine, Shakespeare, estas jam tempo reveni hejmen..."

Kaj li komencis kunligi hungaran bukedon

Kiel ĝenerale ĉe kunmeto de antologioj, ankaŭ por Kalocsay la plej gravajn zorgojn kaŭzis: el la granda literatura materialo elekti tiujn erojn, kiuj malgraŭ la limigita amplekso, eĉ se ne komplete, tamen kontentige reprezentu la beletran trezoron de la hungara nacio, krome la kolekto donu valoran kontribuon al la Esperanta literaturo kaj interesajn legaĵojn al la legantoj. Eĉ se ne paroli pri tio, ke ĉe la kunmeto – ĉefe ĉe poeziaĵo – la redaktoro devis kalkuli jam tradukitajn pecojn.

En la antaŭparolo skribas Kalocsay:

"Redaktante ĉi tiun antologion de la hungara literaturo, mi bone konscias, ke mi surprenis taskon, kiun mi ne povas perfekte plenumi, pri kiu mi devas kontentigi je pli- malpli doloraj kompromisoj..."

Kalocsay konsidere la postulojn kaj eblojn, prezentis aŭtorojn, kiuj komencis sian verkadon antaŭ la mondmilito.

Estas valora kontribuo, ke la antologion enkondukas 15 p. studo de Mihály Babits. Tiun studon (tradukitan de L.Totsche) verkis Babits okaze por la franca, t.e. eksterlanda publiko, kiu pretendas ĝeneralan orientadon pri la historio de la lando, el kies grundo elkreskis la hungara literaturo.

La libro aparte donas la poezion kaj la prozon. La poezia parto estas impona. Ĝi donas ampleksan panoramon de la hungara poezio ekde la unua signifa lirikisto B. Balassi (1551-1594) ĝis L. Kassák (1887-1967), kiu en siaj versoj estas reprezentanto de la ekspresionismo, dadaismo, konstruktivismo.

Kalocsay tradukis 137 poemojn. La kontribuo de F. Szilágyi estas 9 kaj tiu de J. Baghy 1.

La proza parto enhavas 30 novelojn, el ili 3 estas tradukoj de Kalocsay.

La ĝeneralan orientadon helpas skizaj biografioj antaŭ la verkoj de la aŭtoro. Pri ili zorgis L. Totsche.

La listo de vortklarigoj registras 56 vortojn ne estas troveblaj en la PLENA VORTARO de SAT. El tiuj neologismoj 10 estas proponitaj en la PARNASA GVIDLIBRO, kiu tiutempe ekscitis la neologmiliton, ĉar en la *Hungara Heroldo* aperis ofendtona artikolo, kiun akre refutis la redaktoroj de *Bibliografia Gazeto.*

La cikanoj – flanke de la simplistoj – apenaŭ povis grave difekti la ĝojon kaj fierecon: jen apud la kataluna, bulgara, belga, estona antologioj aperis la kvina, kiu – fare de Esperanto – konigas literaturajn trezorojn de la malgranda hungara nacio.

*

Pasis kvindek jaroj post la apero de la Kaloĉaja antologio. Estis jam tempo kunmeti novan kolekton. La nova eldono celis prezenti novajn aŭtorojn. La dika volumo enhavas 241 verkojn de 73 aŭtoroj. El la 52 aŭtoroj de la unua antologio nur 28 trovis lokon en la dua, kaj entute 40 verkoj estas samaj en la du libroj. La kontribuo de Kalocsay estas traduko de 109 poemoj kaj 3 noveloj. Do la dua eldono nur parte estas reeldono de la unua.

La nova eldono du poemojn – D. Kosztolányi: *Post via jar' kvardeka* kaj L. Szabó: *En la arbaro de l' envio* – erare atribuas al Kalocsay. Ilin tradukis L. Tárkony.

*

El la poemoj de HUNGARA ANTOLOGIO en 1985 aperis disko sub titolo BUKEDO EL LA HUNGARA POEZIO(84).

(83) La poemtradukoj de Kalocsay estas listigitaj en la ĉap. 8.2
(84) Vd ĉap. 8.21

8.8.1 Esenca bibliografio

Sturmer, K .R. C.: *Hungara Antologio.*
BG 1933:2, p. 20–23.
Balkányi, P.: *Hungara Antologio.*
HH 1933:3, p. 22–24.
Ventura, A.: *Hungara Antologio.*
TBE 1933:julio, (339), p. 123.
Dresen, H.: *Hungara Antologio.*
Informoj de E-Asocio de Estonio 1933:aprilo-majo, (134–135), p. 30.
Waringhien, G.: *Hungara Antologio.*
LM 1933/87–90, 100–102.
Biehler, d-ro fil.: *Hungara Antologio.*
Aŭstria Esperantisto 1933:5, p. 57–58.
N. N.: *241 verkoj de 73 aŭtoroj.*
BI 1982:6, p. 1.
Lapenna, E.: *Novpolurita klasika brilo.*
HdE 1984:7, (1730), p. 4.
Radó, Gy.: *Eszperantó tükörben* (En spegulo de Esperanto).
Élet és Irodalom (Vivo kaj Literaturo) 1984.08.10.
Boulton, M.: *Mirinda monumento el minorita lingvo.*
HV 1984:6, 235–236.
Zilah, E. de: *Hungara Antologio.*
LF 1987:107, p. 22–26.

8.8.1.0 Notoj kaj referencoj

KONATIĜU. p. 11.
BG 1933:4, p. 59. Karczag, G.
NE 1933:majo, p. 182.
HH 1934:1, p. 3-4. Takács, J.
HH 1934:2. Kökény, L.– Takács, J.
LL 1934:1, p. 5. Balkányi, P.– Karczag, G.
Paco 1966:151, (Hungara eldono), p. 10–11. S. Szathmári.
HV 1982:2, p. 49.
BI 1983:8, p. 5; 1983:12, p. 13; 1984:8, p. 10; 1985:4, p. 10. G. Mihalkov.
BI 1984:12, p. 13. I. Nagy.
Magyar Szó (Hungara Vorto) 1985.02.16. F. K.
En la 1-a vol. p. 93, 127.
Ĉi-libre p. 1, 53.

8.8.2 VERSEK – POEMOJ(85)

Hungaraj – Esperantaj
Tradukis K. Kalocsay.

Redaktis Perla Pug (Gyöngyi Szántó).
Budapest: Klubo de Miniaturaj Librokolektantoj 1974.
6 x 4 cm, 32 p.

Aperis 500 numeritaj ekzempleroj.
Komerce ne vendiĝis.

La mini-antologio enhavas po unu mallongan poemon de dek unu hungaraj poetoj de la XIX-a jarcento ĝis niaj tagoj. Jen perleto el ili en paralelaj hungara kaj Esperanta lingvoj:

Gyula Juhász (1883-1937)

MILYEN VOLT...

Milyen volt szőkesége, nem tudom már,
De azt tudom, hogy szőkék a mezők,
Ha dús kalásszal jő a sárguló nyár,
S e szőkeségben újra érzem őt.

Milyen volt szeme kékje, nem tudom már,
De ha kinyílnak ősszel az egek
A szeptemberi bágyadt búcsúzónál
Szeme színére visszarévedek.

Milyen volt hangja selyme, sem tudom már,
De tavaszodván, ha sóhajt a rét,
Úgy érzem, Anna meleg szava szól át
Egy tavaszból, mely messze, mint az ég.

KIA ESTIS...

Kia estis ŝia blond', mi jam ne scias,
sed scias, ke l' kamparo estas blonda
se l' spikoriĉa or-somer' radias...
Mi ŝin resentas en ĉi oro onda.

Kaj ŝia okulblu'? Mi jam ne scias.
Sed se la bril' septembra de l' ĉielo
post nubokrev' adiaŭtriste strias,
reviĝas el mi ŝia okulhelo.

Kaj ŝia voĉosilk'? Mi jam ne scias,
sed en suspir' de l' kampo printempflora
la varma vok' de Anna melodias
el florsezon' pli-ol-ĉiele fora.

(85) Listigitaj en la ĉap. 8.2

Bibliografio

HV 1975:5, p. 32.



8.9 Sándor Petőfi: LIBERO kaj AMO[86]

Elektitaj poemoj.

El la hungara tradukis K. Kalocsay.

Budapest: Corvina 1970.
19 x 11 cm, 260 p. Bind.

Ne estas poeto pli proksime al la koro de hungaroj ol Sándor Petőfi, tiu ĉi "brila kometo" de la hungara liriko. Lian poezion karakterizas la popola freŝeco, originaleco, revoluciemo.

La literatura agado de Petőfi ampleksas entute ses jarojn, tamen tiu kurta tempo sufiĉis por li atingi la Parnason. Petőfi jam dumvive akiris larĝan popularecon kaj gloron. Krom tiuj la feliĉo ne favoris lin. Korpa malforto, mizero, persekutado estis lia sorto.

Tiu ĉi "ardanima poeto" starigis en la centro de sia poezio la popolon, el kiu li devenis. Li levis sian voĉon kontraŭ la Habsburga subpremo, kontraŭ feŭdalismo kaj socia maljusto. Per plumo kaj per laŭta voĉo li postulis sendependecon por Hungario, liberecon por ties popolo, liberecon tutmonde. Li oferis eĉ sian vivon por la ideoj:

LIBERECO, EGALECO, FRATECO.

Ĉi tiu entuziasma patrioto – kiel adjutanto de generalo Bem – en la liberbatalo (1848-1849) serĉis la plej grandajn danĝerojn. En sia dudeksesa jaro li fariĝis viktimo de la malgajnita batalo ĉe Segesvár (nun Sighisoara, Rumanio). Neniu scias kie kaŝas liajn cindrojn la patrin-tero.

La ekzemplodona vivo de Petőfi fariĝis simbolo de la libereco en Hungario. La nomo de Petőfi hele lumas ankaŭ post multaj jardekoj, kiel li aŭguris en la poemo verkita en 1843.

Profetaĵo

Patrin, la sonĝoj ne mensogas:
eĉ se min kaŝos ĉerkkovril',
eterne vivos glora nomo,
poeta nom' de via fil'.

El la hungaraj poetoj certe la nomo de Petőfi estas la plej konata en la mondliteraturo. Liaj poemoj estas tradukitaj al pli ol 50 lingvoj. Nin, esperantistojn plenigas fiereco, ke ankaŭ nia lingvo kontribuas al la mondkonateco de Petőfi. Hungaraj esperantistoj – Á. Marich, R. Fiedler, R. Rajczi, J. Fuchs – jam frue interpretis Petőfi-poemojn. Tamen la genian lirikan poeton de la Esperanta mondo ekkonis pli vaste el la ampleksaj tradukoj de Kalocsay, kiu jam en 1920 aperigis Petőfi-poemojn. La eminenta tradukartisto Sun Yong – krom aliaj hungaraj literaturoj – transplantis multajn poemojn de Petőfi al la ĉina lingvo, parte pere de la Esperanta traduko de Kalocsay.

La elektiaj poemoj de LIBERO kaj AMO prezentas abundan kolekton el la multflanka poeziaĵo de Petőfi. La 130 poemoj de la volumo estas laŭjare ordigitaj kiel ili verkiĝis. Multaj el la poemoj estas jam konataj antaŭ la leganta Esperanta publiko. Ili aperis antaŭe en ETERNA BUKEDO (1931), en HUNGARA ANTOLOGIO (1933) kaj dise en diversaj revuoj.

La volumon enkondukas 13 p. studo, kiu detale pritraktas la vivon kaj verkaron de Petőfi. Kalocsay – kiam laboris super tiu ampleka eseo – prave opiniis, ke por bone kompreni poezion, oni nepre bezonas informon pri la epoko, pri la tiutempaj historiaj okazintaĵoj, pri la sociaj cirkonstancoj, en kiu vivis kaj verkis la poeto.

Por la poemtradukanto Kalocsay, Petőfi estis la plej favorata poeto. Foje intervjuanto faris demandon pri lia unua poem-traduko.

– *Se mi bone rememoras* – respondis Kalocsay – *traduko de la poemo "Banas sin la lumo" de Petőfi.*

La poemo en tralaborita formo venis en la volumon de HUNGARA ANTOLOGIO. Feliĉe la manuskripto de la unua traduko postvivis la forpasintajn jardekojn kaj nun oni eblas kompari la du variantojn.

Jen strofo el la poemo en kiu plej okulfrapa estas la ŝanĝiĝo, tamen ankaŭ la unua varianto ne estas hontinda:

Lasis mi ĝin for... kaj vagabond' mi iĝis,
Inter krimeguloj poste mi sieĝis.
Eĉ nun inter ili honte mi vivaĉas,
Pace vojaĝantojn morte mi minacas.

Jen la dua varianto:

Hejmon mi forlasis, vagas mi la landon,
fine mi miksiĝis en rabistan bandon.
Tie mi nun vivas por la propra honto,
por danĝero de la pretervojaĝanto.

Kalocsay kun mirinda identigo kaj nobla humileco kapablis sekvi la poeton jen sence jen forme. Tiu akordo kelkfoje efikas tiel frape al la hungara leganto, ke tiu, eĉ sen scio de Esperanto rekonas la originalon. La eminenta literatoro Gy. Radó analizante diversajn tradukojn de Petőfi-poemoj, konstatis, ke la formfideleco en la Esperanta interpreto superas tiun de la franca. Kiel ekzemplon li menciis la poemon: *Arb' mi estos, se vi arbo-floro...* Vere tiu poemo de Petőfi (kun kelkaj aliaj) fariĝis kvazaŭ popolkanto kaj en Esperanto estas kantebla same kiel en la hungara:

Arb' mi estos, se vi arbo-floro,
flor' mi estos, se vi rosogut',
Ros' mi estos, se vi sunradio,
por ke unuiĝu nia tut'.

Se vi estas, kara, la ĉielo,
tiam via stel' ŝanĝiĝos mi,
se, knabin', vi estas flam' gehena,
por unuiĝi nin, damniĝos mi.

Al la tradukanto Kalocsay ne kaŭzis problemon ĉu temas pri patriota kanto, ampoemo, pensa, satira aŭ epika poemo. En la transplanto nur malmulto perdiĝis el la valoro de la originalo.

Hodiaŭ certe estas jam superflua pravigi, ke la poezia lingvo bezonas neologismojn. Kalocsay ĉi-foje en *Glosoj* donis ĉiujn klarigojn komune: pri personoj, lokoj (kun la prononco) kaj pri la vortoj ne troveblaj en la PLENA VORTARO kaj ties SUPLEMENTO.

Por resumi tiun juvelan poemaron de la traduka poezio, ŝajnas plej oportuna citi vortojn de Kalocsay el la *Postnotoj* de LIBERO kaj AMO:

"Antaŭ pli ol 55 jaroj mi provis traduki la unuan Petőfi-poemon, antaŭ 45 jaroj pretiĝis la traduko de "Johano la Brava"; plezure nun mi vidas ĉi tiun grandan Petőfi-volumon en Esperanto. La tradukoj, farataj iom post iom dum jardekoj, estis re- kaj repoluritaj, precipe por la atingo de solvo, kiu konservas la popol-lingvan simplecon kaj naturecon de la originaloj kaj eliminas ĉion fremdan al la travidebla klaro kaj intima senpereco de la Petőfia poezio..."

(86) La poemoj estas listigitaj en la ĉap. 8.2

Sándor Petőfi
(1823-1849)

8.9.1 Esenca bibliografio

Csiszár, A.: *Petőfi eszperantóul (*Petőfi en Esperanto).
Népszabadság (Popollibereco) 1970.11.03.
Csiszár, A.: *Szeptember végén...* (Fine de septembro).
Élet és Irodalom (Vivo kaj Literaturo) 1970.12.12.
Jáki, F.: *Libero kaj Amo.*
HV 1970:4, p. 32.
Auld, W.: *Granda poeto kaj revoluciulo.*
HdE 1971:9, (1508), p. 3.
Rossi, N.: *Nova tradukarta juvelo de Kalocsay.*
Esperanto 1971/106.
Capp, C. D. A.: *Libero kaj Amo. Poemoj elektitaj.*
TBE 1971:junio, p. 65.
Carlevaro, T.: *Libero kaj Amo.*
Svisa Espero 1971:6, (junio); repr. en HE 1971:10, p. 5-6.
Radó, Gy.: *Petőfi versei francia és eszperantó nyelven.* (Poemoj de Petőfi en franca kaj Esperanta lingvoj).
Magyar Nemzet (Hungara Nacio) 1972.02.15; repr. en HE 1972:4, p.15-16. (Fragmento).
Blanke, D.: *Sándor Petőfi – poeto de libereco kaj amo.*
Paco 1972:4, (GDR eldono), p. 32-33.
Vatré, H. : *Libero kaj amo de Aleksander Petőfi.*
HV 1973:1, p. 6-7.
Benczik, V.: *Petőfi eszperantóul* (Petőfi en Esperanto).
EM 1973:11-12, p. 3.
Korotkieviĉ, G.: *Sándor Petőfi en la koro.*
HFM 1973:1, p. 7-8.

8.9.1.0 Notoj kaj referencoj

HV 1968;2, p. 4-5; 1968:4, p.10. Kökény, L.
HV 1970:1, p.16. Kökény, L.: *Corvina eldonos la Petőfi-poemaron.*
BI 1973:1, p. 3. Csiszár, A.: *Sándor Petőfi.*
HV 1973:1, p. 8. Benczik, V.: *Petőfi en Esperanto.*
VNYÉ '79, p. 172. Csiszár, A.
Hét (La Semajno) 1982.01.15. Gábor, M.
En la 1-a volumo p. 44, 128.
Ĉi-volume p. 1, 37, 38.

8.10 TRADUKINTO EL LA MONDLITERATURO



8.11 ETERNA BUKEDO(87)

260 poemoj de 111 aŭtoroj.
El 22 lingvoj.

Tradukis K. Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo 1931.
20 x 14 cm, 352 p. Duonlede bindita.

Al la memoro de Antonio Grabowski.

Kiam aperis tiu ĉi poemantologio – la plej ampleksa ĝis 1931 – Leo Belmont demandis:

"Kia aventura vento pelas tiajn strangajn naturojn, kiel mia kara nekonata amiko Kalocsay, sur fremdajn kampojn de artefaria lingvo por sin 'elpoetigi'?" (AD p. 91)

La demandon respondas la prologo-soneto:

Por fuĝi for de l' taga tedo,
Ĝardenojn fremdajn mi trairis.
Plezure gapis mi kaj miris
Kaj kuris mi de bed' al bedo.

Sur ĉiu bedo kaj arbedo
Min freŝaj floroj tente tiris.
Mi pekis: kelkajn mi deŝiris
Kaj plektis ilin je bukedo.

Jes, ŝtelis mi el fremdaj koroj:
Bukedon de ŝtelitaj floroj
Prezentas mi en verda vazo.

Eternaj floroj estas ili:
Eĉ paliĝinte, ŝajnas brili
En bel' sentempa de l' Ekstazo.

"Ĉi tiu poemkolekto – skribas Kalocsay en *Rimarkoj – ne pretendas al si la nomon de grandlitera Internacia Antologio. Mi ja ne preparis ĝin kun tia difinita celo. Se ekplaĉis al mi poemo, mi, kun la fiksa ideo de obsedita esperantisto, provis, kiel ĝi sonus en Esperanto.... la libro ne deziras esti pli ol bukedo de belaj poemoj el la internacia trezoro..."*

Esplorante la enhavtabelon, ni vidas, ke Kalocsay tradukis la plej konatajn poemojn de la plej konataj aŭtoroj. La hungaran poezion reprezentas 33 poemoj, la germanan 23, la francan 34, la italan 14, la bulgaran 9. En la bukedo estas plektitaj praegiptaj, malnovgrekaj, latinaj, ĉinaj, japanaj ktp. nevelkeblaj floroj. Inter la poetoj prezentiĝas ĉefe Petőfi, Goethe, Heine, Shakespeare, Verlaine, Carducci, Baudelaire.

Kelkaj rimarkoj (7 paĝoj) klarigas la uzitajn rimojn kaj ritmojn. La tabelo de neoficialaj vortoj havas 138 vortojn, el ili 24 (signitaj per steleto) ne estas troveblaj en la plej uzataj vortaroj, kelkajn proponis Kalocsay mem.

Klarigoj de propraj nomoj mitologiaj, kaj bio-bibliografiaj indikoj de la poetoj kompletigas la volumon.

S. Szathmári skribis pri la tradukoj de Kalocsay:

"Ofte mi spertis, ke liaj egiptaj tradukoj estas pli egiptaj, la latinaj pli latinaj ol la originalaj. Mirinde estas, kiel li ĉiam trasentis, travivis la etoson, spiriton de la originalo kaj ĝin povas redoni eĉ pli originale, ol la originalo mem." (Paco 1966:151, p. 10)

Prave diris L. Totsche/Tárkony, ke ETERNA BUKEDO estas breviaro por ĉiu, kiu amas la Verson, talismano, kiu akompanas kaj ŝirmas kontraŭ la danĝeroj de la griza vivo, magia manao en la dezerto de la steriliga ĉiutago... (DE PAĜO AL PAĜO p. 88.)

(87) La poemoj estas listigitaj en la ĉap. 8.2 kaj 8.20.

8.11.1 Bibliografio

Minor, K.: *Kalocsay: Eterna Bukedo.*
GE 1932:5, p. 82.
W. R. W.: *Eterna Bukedo.*
TBE 1932:novembro, (331), p. 283-284.
N. N.: *Eterna Bukedo.*
Oomoto Internacia 1932:63, p. 4.
Waringhien, G.:*Eterna Bukedo.*
LM 1932/37-39.
Belmont, L.: *Strangaj animoj.*
AD p. 91-98.
Biehler, D-ro: *Eterna Bukedo.*
Aŭstria Esperantisto 1934:2, p. 19-20.
Kikunobu Matuba: En:*Kalocsay en traduko de orientaj poezioj.*
NLR 6. 1961:36, p. 225-236.

8.11.1.0 Notoj kaj referencoj

Esperanto 1932/85; repr. en EdE p. 129. G. S(troele).
PAĜO p. 88. Totsche/Tárkony, L.
BG 1933:1, p. 14.
ESk 1951:novembro-decembro, p. 1. Rossetti, R.
SKIZO p. 33. Novobilský, V.
NAER 1963:novembro-decembro, p. 192. Su, A.
Paco 1966:151, (Hungara eldono), p. 10. Szathmári, S.
NE NUR... p. 51. Boulton, M.
IF 1989:2, p. 43-49. *La Prefikso...* Vatré, H.
En la 1-a vol. p. 62, 83, 84, 93.
Ĉi-libre p. 1, 48, 53, 75, 81-82.

***

En la aŭkcio, aranĝita dum la 78-a UK en Valencia 1993, la plej altan prezon atingis ETERNA BUKEDO (8000 pesetoj, ĉ. 110 gld).

8.12 J.W. Goethe: ROMAJ ELEGIOJ – LA TAGLIBRO

El la germana tradukis K. Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo 1932.
Dukolore presita.
Ses ilustraĵoj de Stefano Barta.

El la libro 50 ekzempleroj estas presitaj sur arta kretpapero, binditaj en silko kaj signitaj per la propramana subskribo de la tradukinto.
14 x 11 cm, 8o p.

LA TAGLIBRO-n en paralelaj Esperanta kaj germana lingvoj reaperigis Artur E. Iltis. Saarbrücken 1984.

21 x 15 cm, 20 p.

Antaŭ du jarcentoj, precize la 3-an de septembro 1786 la sekreta konsilisto Johann Wolfgang Goethe, unua ministro de princlando Weimar, abrupte forlasis Karlsbad (nun Karlovy-Vary), kien li venis por terapio. Li diris al neniu adiaŭon.

Monsieur Jean-Philippe Moeller estis la kaŝnomo de la poeto, kiu post du monatoj venis al Romo, por sur la klasika tero alproprigi al si la veran, la originalan antikvan kulturon, kompletigi sian memon per ĝia retrovo. Post tempestoj de siaj sentoj la granda liberanto bezonis repacigi sian spiritostaton inter la eterne humanaj, perfektaj fontoj de la harmonio.

Ne nur la belecoj helpis al Goethe retrovi en Romo la sentojn por la disciplinitaj formoj kaj viglaj koloroj, la sentojn de la natureca vivo, kiel ĉefaj motivoj de la vera beleco de la ROMAJ ELEGIOJ. En la tajdo de la entuziasmaj versoj kiel rokoj ĉirkaŭondantaj aperas monumentoj, pejzaĝoj kaj pitoreskaj "osterioj" de la strata popolo, de kiuj la poeto ebriiĝis, kaj des pli ĝuas la simple manifestitajn popolscenojn. Tiujn li, kune kun la bohemaj artisto-amikoj, plezuravide serĉas ankaŭ en la mizeraj kvartaloj: la spurojn de la antikvaj dioj.

De la vivoforto radias la taktoj de la pli-malpli longaj elegioj, ververe triumfaj himnoj – sen ia melankolio – de la plej serena, senkaŝa amoĝuo. La arta volupto igas aparte nobla kaj bela la amoran fervoron, kaj restas nur en la fono la klasika dekoro, "la sanktaj kolonoj de la muroj, Roma eterna!"

Eble kurioza, sed tiaj trajtoj de la romantikismo kunfondiĝas perfekte kun la esenca realismo de Goethe. Tion iom subtenas, ke la Italia inspiro-aro nur poste, en Weimar igis lin krei tiujn versojn, jam superinspirite de la ĉarmoplena Kristina Vulpius, amatino kaj estonta edzino. Tiam, ĉirkaŭ sia kvardeka jaraĝo, la sude malkovritan paganecan ĝojon de la vivo li devis plende rememori el Weimar, kie "pli naŭzas min la funebraj nebuloj de l' nordo..." La antikva senpeka erotiko des pli intense plenigas liajn sincerajn plezurojn, ju pli ĝi kontrastas al la fremdiĝanta realo en Weimar, kaj ĝuste tio formas la elegiojn majstroverkoj.

La distikoj de Goethe la klasikan arton kaj atmosferon ja speguli emas, sed premas ankaŭ neeviteble la germanan tekston, la aliecan germanan lingvon en korseton ne tre konvenan; la traduko de Kalocsay, kiu ne nur sence, sed ankaŭ forme strebis al alta fideleco, plejparte sonas multe pli muzike, pli dolĉe, dank' al la Zamenhofa lingva muzikeco – kaj al la majstropianisto de tiaj tonoj. Severeco povas jen-jen trovi malglataĵojn en la heksametroj, kaj la propran verkadon ĉiam severe ekzamenanta Kalocsay mem poste juĝis la ĉi tie uzitan

manieron de prozodio ne plene kontentiga – pro la naturo de Esperanto. Tamen longe li devis esplori ĝis li alvenis al la "oktometrigo" de la distikoj, kun pli sukcesaj efektoj.

Certe la aleksandroj de la TAGLIBRO prezentis malpli da malfacilaĵoj poeziaj por la genio de Kalocsay. Li lertis facilmane – almenaŭ tiel al mi ŝajnas – kvazaŭ altplaĉe rerakontante la sprite ĉarman kaj frivolan epizodon. Oni povas trankvile diri, ke tiu kelkdekstrofa poemo saturita kaj de amoremo, kaj de memironio de la sesdek-jara Goethe, staris aparte proksima al la individueco de Kalocsay. Sendube ili ambaŭ, la poeto kaj la poetotradukisto, nuntempe esprimus siajn pensojn multe pli senĝene, ne sentante jam la premon de la prudeco de siaj epokoj – kaj tio koncernas ambaŭ verkojn de la volumo. Tiam krude-nude elskribi "hominstinkton" ne eblis.

"Vi multon bonan en ĉi libro trovos,
Sed la plej bonan skribi mi ne povos".

Notis la poeto en sian "taglibron" al la edzino memore pri ĉi aventuro en la pretervoja vilaĝa hotelo, kvankam la emo skribi plian ĉiufraze ŝvelas kaj kreskas, simile al la kutimo de la – alifoje – "brava Bubo"...

LA TAGLIBRO dum la pasintaj tempoj kompreneble mankis en la "elektitaj poemoj" de Goethe. Ĝi kalkuliĝis inter la klasikajn erotikaĵojn, kiujn oni eldonis aparte, karapreze por "bibliofiloj".

Verdire la lingvo de la tradukaĵo estas agrable ĝuebla; la tre malmultaj siatempe neologismoj iĝis dume aŭ oficialaj, aŭ bone konataj de la legantoj, kiuj pro tiuj jam ne bezonas serĉi en la fina ĉapitreto de klarigoj (ekz. nupto, sinki, tajdo ktp), kie troviĝas kelkaj necesaj informoj pri la antikvaĵoj. Mi konsentas kun la decido de Kalocsay, kiu ellasis kvin elegiojn, tiujn, kiuj entenas relative tre multe da mitologiaj kaj filologiaj, literaturaj menciojn el la abundaj konoj de Goethe. Malgraŭ kelkaj mirindaj versoj, la malfacila legado pro la multaj klarigindaj nomoj kaj aferoj malhelpas ĝui agrable tiujn elegiojn al la plej multaj nuntempaj legantoj, kiuj nur foje-foje, por tiaj plezurigaj verkoj revenas al la klasika mondo de la harmonia belo.

Ervin FENYVESI
Budapest, 1981

8.12.1 Bibliografio

KONATIĜU p. 15.
Waringhien, G.: *Romaj Elegioj.*
LM 1932/174-175.
Waringhien, G. : En: KAJ LA CETER' p. 33-36.
Eta (Csiszár, A.): *La Taglibro/Das Tagebuch.*
BI 1984:12, p. 14.
VORT-STATISTIKAJ ESPLOROJ. Saarbrücken: Iltis 1986. 41 p. (p.38). Vatré, H.
Ĉi-libre p. 1.



8.13 Dante Alighieri: INFERO
(Unua parto de la Dia Komedio)

El la itala tradukis K. Kalocsay.

Lignogravuraĵoj de D. Fáy.

Budapest: Literatura Mondo 1933.
24 x 16 cm, 289 p.

Represo, ampleksigita per postparolo de G. Waringhien.
Notoj de G. Silfer.

La Chaux-de-Fonds: Literatura Foiro, 1979.
Dukolora kovrilo, 292 p.

La Inferiro de Kalocsay

Antaŭ multaj jardekoj, kiam Kalocsay decidis traduki la INFERON, la plano konsternis la Esperantan literaturistan mondon. La entrepreno ŝajnis freneza aventuro, ĉar ankaŭ la originala verko de Dante ne estas facila legaĵo. La leganto devas fari studojn por kompreni la Komedion, oni devas ekkoni la historion de la tiama Florenco, la socian vivon de tiuj tempoj. En la verko abundas malpli konataj eventoj, aludoj, kiuj facile konfuzas la leganton.

La traduko de la INFERO postulas intensan studon ankaŭ de la tradukanto, precipe se tiu ne estas italo. La interpreto de la originala versformo, en tercinoj, ŝajnis neplenumebla. Sed ĝuste la baroj incitis la tradukemon de Kalocsay. Vane estis avertoj de la amikaro, kaj maliculoj vane citis la timigan pordegan surskribon:

Lasciate ogni speranza, voi ch' entrante!

– t.e. *Ĉiun esperon lasu ĉe la enpaŝo!* – Kalocsay ne rezignis pri la traduko.

Dum la laboro eĉ Kalocsay mem dubis pri la sukceso. En la *Antaŭparolo* de la volumo li priskribis la malfacilaĵon kaj fortostreĉon, kiujn postulis la traduko:

"*...Mi konfesas, ke la inkuba sento pri ĝia neebleco ofte, kaj ĉiam denove, kaj ĝis la lasta kanto de l' Infero vekiĝis en mi, vere eĉ la lasa kanto mi dubis, ke mi povas ĝin fini...*"

Pri la turmenta traduk-laboro konfesas aliaj vortoj de Kalocsay. En 1937 intervjuanto demandis lin, kiun el siaj verkoj li amas pleje. Kalocsay senhezite respondis:

"*Gepatroj kutime amas pleje tiun el siaj infanoj, kiu kostas al ili plej multe da peno kaj zorgo. Mi plej amas la Dante-tradukon.*" (AD p. 35)

*

Pri la DIA KOMEDIO de Dante la literatoroj verkis jam tutan bibliotekon. Eĉ ĝia skiza prezento postulus ampleksan lokon, eĉ se ne paroli pri fakscio. Ĉi-loke estas eblo prezenti iom el la tuto. Ĉu kiun? Kalocsay probable konsideris plej sukcesa (eble plej interesa) la interpreton de la V-a Kanto, ĉar li ne unufoje recitis ĝin antaŭ publiko.

En tiu kanto la du transmondaj migrantoj – Dante kaj Vergilius – renkontiĝas kun kulpuloj de la amo. Tie, en la dua rondo de la Infero komenciĝas la dia puniga potenco. Jen:

Terure kaj dentgrince Minos staras
ĉe la enir' kaj kulpojn ekzamenas
kaj per vost-volvo regas, juĝon faras.
Ĉar se animo misnaskita venas
kaj ĉiujn kulpojn antaŭ li recitas
li, kiu l' kulpojn konas kaj komprenas,
pri l' lok' infera pese primeditas,
kaj faras vosto-ringojn, tiel multe,
kioman infer-gradon ĝi meritas.

Kaj la spiritoj senĉese venas antaŭ la juĝiston kaj post la verdikto ili subfalas al la indikita loko.

Eksonis nun doloraj voĉoj krie.
Ni venis lokon, kie orkestro tuta
de veoj, ĝemoj batis min furie.
Jen estis lok' de ĉiuj lumoj muta.
Ĝi muĝis, kiel mar' dum furioza
batal' kun vento malamike bruta.
Infera vent'; eterne senripoza,
spiritojn multajn tie ŝire trenis,
flugige, bate, en turnado kroza.
Kiam al la ruino ili venis,
kun ploro kaj veado kaj lamento
la Dian Forton ili ekblasfemis.
...
Ekscitis nun mi, ke per ĉi turmento
damniĝas, kiuj pekis per la karno,
submetis saĝon al libida sento.

Jen venas taĉmento da kondamnitoj. Ili formas longan linion kiel gruoj. Tiujn molkrie veantajn ombrojn la amo puŝis en turmentan morton. Kaj antaŭ la okuloj de Dante fortiriĝas mondfamaj damoj, kavaliroj: Semiramis, la voluptema asira reĝino; Dido, reĝino de Kartago, kiu bruligis sin mem sur ŝtiparo; Kleopatra, la memmortiganta egipta reĝino; Helena, la kaŭzo de la troja milito; Aĥilo, kiun kruele venkis la amo, Paris, la forrabinto de Helena, kies vivon estingis la sago de Philoktetes; Tristan, kiun mortigis la edzo de Izolda; jen Francesca, kiu enamiĝis al sia bofrato Paŭlo, kaj la edzo mortigis ilin.

La Kvina Kanto finiĝas per la korŝiraj plendoj de Franceska, kion ankaŭ Dante jam apenaŭ povas elteni:

Dum ŝi parolis, la kunul' kun ploro
lamentis tiel, ke mi tute palis,
kaj sentis kvazaŭ morton ĉirkaŭ l' koro;
kaj kvazaŭ morta korp', mi terenfalis.

*

La traduko de INFERO liveras abunde neoficialajn vortojn, ekz. la vorto *stinka* (malbonodora) en tiu tradukaĵo estis uzita unuafoje. Kalocsay ofte eksplikis, ke novaj vortoj estas necesaj en la poezio, kie oni povas des pli facile rimi kaj plej fidele interpreti, ju pli oni povas elekti el vortoj diverslongaj kaj diversfinaj. La delikat-nuancaj italaj esprimoj en la INFERO precipe pretendis uzon de neologismoj, pro kio multaj riproĉis al Kalocsay.

L. Halka foje faris demandon al Kalocsay:

– Ĉu vere vi ne estis povinta traduki la INFERON sen neologismoj?

– *Ne* – respondis Kalocsay – *tion mi diras kun trankvila konscienco. Cetere, nur la kvinono de ili estas nova aŭ PARNAS-GVIDLIBRA, la ceteraj troviĝas en konataj vortaroj.*

(AD p. 37)

En la volumoj uzitaj neologismoj estas klarigitaj jen piednote, jen en aparta listo.

Dum la traduk-laboro – krom la malfacilaĵoj de la interpreto de Dante – la tradukanton afliktis ankaŭ la konflikto ĉe *Literatura Mondo*, kies kaŭzo estis la neologismo. Pri tio konfesas letero de Kalocsay, skribita al H. Drezen. (Dato mankas). Jen fragmento el ĝi:

"Eble mia letero estas iom konfuza, sed tio fidele spegulas mian animan staton. Min trafis dolora bato, min senrevigis pri io, por kio mi laboris longajn jarojn. Se nun mi pensas pri la nepretaj kantoj de INFERO, mi konfesas, ke mi dubas, ĉu mi povas ilin fari en la konscio, ke mi faras tute senutilan laboron. Mi konfesas, ke de kiam tre malnova, tre fervora, tre influata esp-isto skribis al mi, ke mi verku por mi mem, ĉar mi malutilas ol utilas, mi ne povis traduki eĉ unu tercinon. Malutili per tiel pena laboro al io, kion mi amas – kio estas pli stulta en la mondo?..."

Malgraŭ ĉiuj baroj la tradukanto triumfis. Por resumi la tradukon de Kalocsay, ŝajnas per konvena citi kompetentulon, la italan profesoron B. Migliorini, kiu tiutempe recenzante la volumon, skribis inter alie:

"...Antaŭ dek jaroj, en la Antaŭparolo de Esperanto Gramatiko por italoj, montrinte la gravecon de Esperanto kiel traduklingvo, mi tamen deklaris, ke oni devas atendi malpli efikajn rezultatojn en la verkoj, kie la intereso pri la formo superas tiun pri enhavo (do en la puraj literaturaj verkoj), kaj mi skribis, ke estas malfacile havi eĉ nur mezbonan tradukon de la Dia Komedio. En la lasta eldono de nia gramatiko, mi forstrekis tiun ĉi frazon, ĉar dume aperis la unuaj kantoj de la traduko de D-ro Kalocsay..."

*

La valoron de la reeldonita INFERO pliigas la Postparolo speciale verkita de G. Waringhien. La flava-ruĝa kovrilo de la reeldonita libro kvazaŭ hipnotizas nin por descendi en la inferan mondon.

*

Nur sporade troviĝas Esperanto-libroj, kiuj donas al la legado tiom multan helpon, kiel ĉi tiu tradukaĵo. Kalocsay per abundaj klarigoj klopodis kiel eble plej redukti la malfacilaĵojn, kaj kiel konscienca ĉiĉerono akompanas eĉ gvidas nin por ne vojerari en tiu ĉi timiga regiono.

8.13.1 Esenca bibliografio

Neman. P.: *Dante Alighieri:Komedio.*
NE 1933:12, p. 195-196.
Waringhien, G.: *Post la legado de Dante.*
LM 1933/161-162.
Migliorini, E.: *Dante: INFERO.*
LL 1934:1, p. 9-10; repr. en AD p. 102-105.
Hartog, J.: *Dante kaj Kalocsay.*
NE 1934:marto, p. 120-122.
Ĵaumotte, M.: *"La Infero", infera laboro.*
AD p. 89-90.
Solzbacher, W.: *Kalocsay – Esperanto translation of Dante's "Inferno".*
AEM 1949:novembro-decembro, p. 158-159.
Conterno-Guglielminetti, C.: *Dante en Esperanto.* (Pri la traduko de Peterlongo kaj tiu de Kalocsay.
HdE 1963:16, (1366) p. 2.
Giorgi, A. de': *"Fajrero de Kalocsay".*
HdE 1978:3, (1627), p. 3.
Cool, J.: *Grandioza traduko.*
HdE 1980:14, (1672), p. 4.
Bauer, A.: *Dante Alighieri: Infero.*
LF 1980:64, p. 140-141.
Csiszár, A.: *La inferiro de Kalocsay.*
BI 1981:2, p. 6-7.
Nervi, M.: *Fundamento, la literatura.*
Esperanto 1981/132.
Waringhien, G.: *Infero.*
KAJ LA CETER' p. 41-47. (En iom alia formo ĝi aperis antaŭe kiel *Postparolo* al la represita INFERO, ĉe Literatura Foiro 1979).
Giorgi, A. de': *Fratoj La Colla kaj Kalocsay.*
l'esperanto 1987:decembro, p. 10.
Csiszár, A.: *"Danĝera vojo".*
VERSOJN p. 55-60.
Silfer, G.: *Itala triptiko.*
VERSOJN p. 61-62.

8.13.1.0 Notoj kaj referencoj

KONATIĜU p. 10.
AD p. 34-35. Kalocsay, K.
FE 1953:129, p. 15.
SKIZO p. 33-34. Novobilský, V.
NLR 6. 1960:31, p. 23-27. En: *Letero al Brenda pri la afiksoj.* Vatré, H.
Rivista Italiana di Esperanto. Milano. 1963, p. 37-39. Conterno-Guglielminetti, C.
MK 1963:4, p. 127-128. Auld, W.
Paco 1966:151, (Hungara eldono), p. 10-11. Szathmári, S.
LA KONTRIBUO p. 14. Haupenthal, R.
VORT-STATISTIKAJ ESPLOROJ. Saarbrücken: Iltis 1986. 41 p. (p. 40). Vatré, H.
LF 1980:60, p. 27.
IF 1989:2, p. 43-49. *La Prefikso...* Vatré, H.
IN MEMORIAM p. 34-35. Csiszár, A.
IF 1995:3, p. 78-79. *Ofteco de la sufiksoj -ig kaj -iĝ en kelkaj tradukoj.* Vatré, H.
En la l-a vol. p. 26, 47, 62, 127.
En la 2-a vol. p. 32-33, 98.
Ĉi-libre p. 1, 65.

8.13.2 SUPER LA INFERO DE DANTE

Al la Esperanta tradukinto.

Je l' vojomez' de sia vivo tera
sin trovas la homar'...Ĉu ne ĉe l' fino?
Ĉu ĝi ne povas – per vojaĝ' infera –
eskapi el la fundo de l' ruino?
La ŝtormoj tondras, horizontoj fajras,
la hom' en infer-farsa halucino
al homo membrojn hakas, rompas, najlas.
Super la kapojn de senpova gento
el nigraj nuboj plumbo-pluvo hajlas
kaj ruĝa sango fluas en torento.
Veas la homa greg', supren rigardas
kaj petas helpon de sur firmamento.
Tamen ho! la anĝela helpo tardas.
Certe triumfos – ŝajnas jam – Satano.
la homajn filojn la ĉiel' ne gardas.
En tiu hor' jen milda, mola mano
etendas sin al mano de l' dronanto
por doni helpon de la Akompano:
Mano de l' Majstro, la Esperdonanto.
Kaj Li certigas per profeta vorto,
ke la esper' ne estas nur vanto,
ke ĉesos la inkubo de la morto,
de la masakroj kaj Apokalipso:
Leviĝos sur la ter' kun nova forto
ne plu la hom-serpent', sed hom-fenikso,
kiu forgesos la murdad-kruelojn,
transnaĝos l' ondojn de l' infera Stikso,
eliros el la Put'... kaj vidos stelojn.

Tomaŝ PUMPR

8.14 Charles Baudelaire:
LA FLOROJ DE L' MALBONO[88]

El la originalo tradukis: K. Kalocsay, G. Waringhien, L. Tárkony, H. Vatré, M. Carlsson, R. Bernard, H. Dresen.

Enkonduko kaj notoj de Kalocsay–Waringhien.
Redaktis Kalocsay–Waringhien.

Belliteratura serio n-roj 8-9.
Ilustrita de du portretoj de la aŭtoro.
Kovrilo de John Hartley.

La Laguna: J. Régulo 1957.
23 x16 cm, 400 p.

Je la centjara datreveno de la apero de LES FLEURS DU MAL.

En la esperantigita volumo abunda *Enkonduko* kaj postaj *Notoj* informas la legantojn pri la vivo kaj poezio de Baudelaire, pri la granda signifo eĉ – kiel P. Thorsen skribis – aŭdaco de la esperanta eldono. Ĝuste tial eble ne estas superflue ankaŭ ĉi-loke prezenti kelkajn indikojn ĉerpitajn el la *Enkonduko:*

Charles Baudelaire naskiĝis en 1821 en Parizo. Li estis ses-jara, kiam mortis lia patro. La patrino kaj la edukpatro kontraŭis la literaturajn klopodojn de la knabo. Por "malebriigi" la junulon, ili ŝipveturigis lin al Ekstrem-Oriento. Tamen Charles jam decidis sin al la poezio.

En 1842 li revenis en Eŭropon kaj dum kelkaj monatoj disipis la sufiĉe riĉan heredaĵon de sia patro. De tiu tempo Baudelaire baraktis en financa embaraso, amasigis ŝuldon sur ŝuldo. Lia tuta vivo estis ĉeno de korpaj kaj animaj turmentoj. La diboĉa vivmaniero, narkotismo kaj sifiliso puŝis lin en tombon. Li mortis 46-jara.

La LES FLEURS DU MAL (aperinta en 1857) elvokis la indignojn de hipokritoj, kiuj konsideris la verkon moraldetrua pornografio. Baldaŭ komenciĝis proceso kontraŭ la aŭtoro kaj la eldonisto. La verdikto estis monpuno, krome la juĝistaro malpermesis la eldonon de ses poemoj. La "floroj" de la volumoj tiutempe neniel estis enbukedigeblaj en la tradician poeziaĵon, ĉar Baudelaire ne timis eldiri per plena sincereco eĉ la plej krudajn verojn kaj turpaĵojn. En liaj poemoj inundas la sentoj, la ĉagrenoj, suferoj kaj spasmaj fortostreĉoj de la grandurba vivo kaj moderna epoko.

Baudelaire estis tiu "damnita" poeto de la 19-a jarcento, kies belec-ideo, viv- kaj literatur-koncepto tute kontraŭis kun tiu de la samtempuloj. Inter la verkistoj apenaŭ troviĝas tiel multe atakata (aŭ nekomprenata), kiel Baudelaire. La hungara poeto Endre Ady jam en 1905 tradukis Baudelaire-poemojn, kiujn la tiutempaj konservativuloj taksis kvazaŭ "spiritan epidemion" kaj obstinis, ke la liriko de Ady ĝermos el la semo, kiu el la "malbonaj floroj" defalis al Hungario.

La poezio de Baudelaire nur post lia morto komencis efiki kaj ĝiaj stimulaj sukoj nur post iom da tempo ensorbiĝis en la sangocirkuladon de la moderna literaturo.

La klera Kalocsay jam kiel studento malkovris la poetan gigantecon de Baudelaire. Lia unua transplato *La invito al vojaĝo* aperis en *Literatura Mondo* (1922/5). Kaj venis pluaj tradukoj unu post la aliaj. Kiam naskiĝis la ideo pri esperantigo de la LES FLEURS DU MAL, Kalocsay jam posedis bukedon el ĝi. Estas memkompreneble, ke la alia klerulo, la franca G. Waringhien ĝisfunde konis kaj alte taksis la poezion de la samlanda poeto. Oni ne povas eĉ imagi iom pli harmonian kaj bonŝancan kunlaboron por la Esperanto-transplanto, ol

la kooperon de tiuj du. Ĉiujn poemojn de la volumo ili pritraktis, fajlis kaj refajlis komune. Waringhien kontrolis la sencan fidelecon, Kalocsay reviziis la formon. La rezulto estis tiu ĉi majstra traduko. El la poemaro Kalocsay tradukis 111 pecojn, kune kun Tárkony du aliajn, la kontribuo de Waringhien estas 32, L. Tárkony 16, H. Vatré 9, M. Carlsson 3, R. Bernard 3, H. Drezen 1.

La redaktoroj motivis sian entreprenon en la *Enkonduko* jene:

" Ni elektis por traduko la FLOROJN DE L'MALBONO el diversaj motivoj. Unue, pro ties aparta graveco: eble neniu poemlibro havis tian efikon al la evoluo de la moderna poezio, kaj preskaŭ ĉiuj postaj grandaj poeziaj tendencoj havas en ĝi sian radikon. Due, ŝajnis al ni signifa, ke per ĉi tiu volumo ni povas komplete prezenti poeton el la plej grandaj; kaj tio okazos en Esperanto la unuan fojon. Trie, la traduko de Baudelaire estas certe unu el tiuj "malfacilaj taskoj", kiujn Zamenhof ĉiam insiste rekomendis al niaj tradukistoj: la klasika koncizo kaj romantika brilo de l' esprimo; la kompaktaj, pezaj sonoraj versoj; la mirinde arta kundensigo de la pensoj kaj sentoj en la prizonon de l' formo; la preskaŭ muzika kompono, kie la sonpentro per vokaloj kaj konsonantoj ludas tiel gravan rolon; la romantikaj riĉaj rimoj; la aparta gravo de la rimelekto por la emfazo de l' enhavo – ĉio ĉi povas esti adekvata reproduktita nur per ekstrema klopodo kaj nur en la poezie matura lingvo. Ŝajnis do al ni utilega, elmeti nian lingvon al ĉi tiu severa provo..."

La traduko eltenis la provon.

*

La *Glosaro* registras 84 vortojn ne troveblajn en la PLENA VORTARO.

"Pri l' neologismoj de la verko – diras la redaktoroj antaŭparole – *estas tute senfrukte renovigi ĉi tie la malnovajn diskutojn. Kiun la libro mem ne konvinkis pri tio, ke niaj novaj vortoj estas enkondukitaj ne el Dio scias kia hereza kaprico, sed el praktika neceso, kiun trudas la poezia konkero de ĉefverkoj, kiel ĉi tiu, tiun oni vane penus fleksi per argumentoj..."*

*

Pri la volumo la recenzanto de HdE (1957:13, <1255 >, p. 4) skribis:

"...Admirinde estas la kuraĝo de la eldonejo enmeti tian libron en sian eldonprogramon..."

Feliĉe al Régulo Pérez ne mankis kuraĝo, al la tradukintoj (krom la talento) la dekjara persisto kaj firma fido, ke ankaŭ la Esperanta publiko almaturiĝas al ĉi tiu poezio. La rezulto de ilia fido kaj kunagado:

Jen, la "floroj" de Baudelaire aromas jam ankaŭ en Esperantio.

(88) La tradukoj de Kalocsay estas listigitaj en la ĉap. 8.20.13

8.14.1 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Auld,W.:*"La floroj de l' malbono"*.
Π Esperanto 1957/194.
Jung, T.: *Libro por miri kaj admiri.*
HdE 1957:13, (1255), p. 4.
Thorsen, P.: *La egocentrika universalisto.*
NP 1957:5, p. 284-285.
Núñez-Dubús, A.: *La Floroj de l' Malbono de Charles Baudelaire.*
Boletín 1957:oktobro-novembro-decembro, (106), p. 102-103.
Ragnarsson, B.: *La Floroj de l' Malbono.*
NLR 3. 1958:3, (15), p. 107-113.
Solzbacher, W.: *Baudelaire en Esperanto.*
AEM 1958:3, marto-junio, p. 48-54.
H. E. J.: *La Floroj de l' Malbono.*
Dansk Esperanto-Blad 1958:1, p. 16-17.

8.14.1.0 Notoj kaj referencoj

NAER 1958: januaro-februaro, p. 4. Richardson, D. B.
NLR 6. 1960:31, p. 23-27. En: *Letero al Brenda pri la afiksoj.* Vatré, H.
NLR 6. 1961:35, p. 189-190. Piĉ, K.
KAJ LA CETER' p. 24. Waringhien, G.
VORT-STATISTIKAJ ESPLOROJ. Saarbrücken: Iltis 1986. 41 p. (p. 40). Vatré, H.
IF 1995:3, p. 78-79. *Ofteco de la sufiksoj -ig kaj -iĝ en kelkaj tradukoj.* Vatré, H.
En la 1-a vol. p. 93, 128.
Ĉi-libre p. 1.


WILLIAM SHAKESPEARE

REĜO LEAR

K. KALOCSAY

8.15 William Shakespeare: REĜO LEAR

El la angla tradukis K. Kalocsay.

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 6.
Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio 1966.
21 x 15 cm, 160 p. Bindita kaj broŝurita.

Eldonita okaze de la 350-a morto-datreveno de William Shakespeare.

Post brila – kaj ĝis nun ne superita – traduko de naŭ ŝekspiraj sonetoj, Kalocsay, jam en sia 71-a jaro, turnis atenton al la ŝekspira dramo kaj, komencante per LA TRAGEDIO DE REĜO LEAR, daŭrigis la eternan defion superi la HAMLET-tradukon de Zamenhof el 1893-1894(89), miraklon de juneca genio, poste konkurintan de sinsekvaj tradukantoj, inkluzive min mem.

La dramon Kalocsay atakis kun ŝturma energio. Rapide tradukinte la unuan akton, li senaverte ĝin sendis al mi, kaj ricevo de mia responda komentario, li tuj kaj senplende refaris ĝin tutan kaj daŭrigis kun tia elano ke, inkluzive la reverkon de la unua akto, li likvidis la tutan taskon en la daŭro de nur kvin semajnoj. Nu, konsterne oni ja trovis la verkrapidon de la 48-jara Zamenhof ĉe IFIGENIO EN TAŬRIDO, eltradukita en du monatoj, eĉ post la profesiaj laboroj, dum Kalocsay en 1962 estis jam emerito; sed evidente en ambaŭ kazoj temis pri eksterordinara energio de genia spirito.

Antaŭ ol taksi la plenumon, ni ĵetu rigardon al la ŝekspira KING LEAR. Ĝi estas dramo, kiu komenciĝas tute kiel mirfabelo per ŝablono de tri reĝinfanoj (ĉi tie filinoj), el kiuj la pliaĝaj estas sentaŭgaj aŭ malbonaj kaj la plej juna estas bona. Ordinare tiu tria sukcesas sub tasko donita komune al la tri. En LEAR la tasko estas postulo deklari al la reĝopatro kiom ili lin amas, ĉar li dividos inter ili sian regnon. La du pliaĝaj filinoj respondas per flataj hiperboloj, sed la plej juna rifuzis tiel "leki la kandelingon" kaj parolas sincere, per tio malplaĉante al la patro kaj perdante la heredon.

Tiu artifika komenco estas jam akceptita de redaktoroj, jen de ili kritikata kiel "netolerebla sur scenejo" (Profesoro Allardyce Nicoll). Se ni akceptas ĝin kiel fabelŝablonon, verŝajne ni atendas la triumfon fine de la plej juna, tria filino, kaj la falon de la du hipokritaj, kion ni ankaŭ akceptos rutine kiel konvencion *happy ending* (feliĉan finon). Sed male la okazoj iras al fino tragika: la mortoj ne nur de la malbonaj fratinoj, sed ankaŭ de la bona Cordelia kaj la patro Lear.

Do Lear estas dramo, kiu komenciĝas komedie kaj finiĝas tragedie, dum ekzemple *A Vinter's Tale* (Vintra fabelo) iĝas komedio post tragedi-aŭgura komenco. Nu en la 18-a jc oni ŝanĝis la tekston de Lear por feliĉa fino. Ĉu malprave? CYMBELINE, kiu ankaŭ ekiras el fabela temo, tiu pri malica stifpatrino, finiĝas ja feliĉe. Sed la hodiaŭa kritiko kondamnas la arogon super LEAR-teksto, ĉar finfine ni volas havi la dramon, kiun Shakespeare fakte verkis, ne ies ideon pri fino formale konforma.

Kaj tiu dramo estas mirinde efekta sur la scenejo. Mi vidis ĝin en tempo, kiam la dramon mi ankoraŭ ne legis, kaj la tuta kompleksa intrigo disvolviĝis klare, kaj sorĉe katenis min. Apud la Lear-Cordelia temo sin plektis ja dua, pri bastarda filo, kiu kalumnias al la patro sian fraton kaj pelas lin fuĝi en la sovaĝan naturon: temo, kiun Schiller pruntis por LA RABISTOJ.

Do antaŭ ni ruliĝas baroka sinsekvo de eventoj en drasta paralelo: bona frato Edgar forpelita kaj Lear forpelita; ŝajnigita frenezo de Edgar kontraŭ fakte freneza Lear. Kaj kia diversa fekundo! Jen Edgar, preninte rolon de freneza ĉifonulo:

> Kiu donas ion al la povra Tom? Kiun la
> turpa demono kondukis tra fajro kaj flamo,
> tra rifo kaj vortico, tra ŝlimo kaj marĉo...
> ...
> La povra Tom, kiu manĝas la naĝantan
> ranon, la bufon, la ranidon, la murlacerton
> la akvo-triton... Al Tom 'stas fride.
>
> (Lear: Kio vi estas?)
>
> Servanta kavaliro, fiera en koro kaj animo; mi krispigis miajn
> harojn, portis gentojn ĉe mia ĉapelo, servis la voluptojn de la
> koro de mia damo, kaj faris kun ŝi la laboron de l' mallumo...
>
> Kvin demonoj ekloĝis en la povra Tom per
> unu fojo: Obidikut, demono de lascivo,
> Hobbididanco, princo de muto, Mahu, de
> ŝtelo, Maŭdo, de murdo, Flibbertiĝibbet, de
> grimacoj kaj lipŝmacoj, kiu, cetere, de tiam
> obsedas servistinojn kaj ĉambristinojn.

Grandparte Kalocsay sukcesis peri al ni la dramon per la respondaj rimedoj de nia lingvo, kiel atestas la supra citaĵo. En kelka grado, vere, la versoj paŝas malpli regule ol la originalo, aŭ la esprimoj estas malpli buŝidiomaj: kelka uzo de *ties* kaj *tiuj* anstataŭ la rektaj *lia* kaj *ili* ĝenas en vulgarparolaj lokoj; kelka cedo al anglismoj: "Malfeliĉulino, kia mi estas, mi ne povas levi la koron en la buŝon (anstataŭ: Mi, malfeliĉa, ne povas" ktp) aŭ okaza surda sinsekvo de "i": "ke *vi indiĝis* je la ardaj larmoj": tiaj makuloj estas pardonindaj en tiel kolosa tasko, kiel ankaŭ la sintakso plurloke tro elizia pro manko de konjunkcio *kaj*, *sed, ke* aŭ *por* ĉe infinitivo, kontraŭ la klara pleneco de la originalo.

De Kalocsay ni pretendas multon. Leginte jam la majstrajn blankversojn de LA TRAGEDIO DE L' HOMO (1924), kaj la fluan pompon de la revizio 41 jarojn poste, oni eble atendis ĉe LEAR simile suverenan potencon sen aldonaj licencoj kaj elipsoj, ja mankantaj ĉe Madách. Eble Shakespeare tro tiris la majstron, aŭ eble temas pri tio, ke (kiel li skribis) "*Mi klopodis... ne la ŝekspiran lingvon laŭeble simpligi, sed la Esperantan tekston laŭeble ŝekspirigi.*" Diskutebla tezo, antaŭ kiu mi mem sentas fortajn hezitojn. Ne tiun principon sekvis ja Zamenhof tradukanta HAMLETON, kaj rezulte ni havas dramon, kiu kaptas kaj emocias nin per la rekta poezia forto en formo pli klarsenca multloke – eĉ por anglalingvanoj – ol la originalo. Konstati, ke Kalocsay poste sukcesis plene en sia sekva provo: la SOMERMEZNOKTA SONĜO, staras ekster mia komisio, sed mi devas ĝin noti, eĉ se nur por legitimi mian pritrakton de REĜO LEAR.

Reto ROSSETTI
Luton, 1984

(89) Ke Zamenhof prilaboris ĝin jam 1893, atestas la tiujara artikolo *Pseŭdo-esperantistoj,* en kiun enfalis du citaĵoj el HAMLETO: *"esti aŭ ne esti"* kaj *"la batoj de la sorto."*

8.15.1 Esenca bibliografio

Auld, W.: *Reĝo Lear.*
Esperanto 1966/70-72.
Martin, R.: *William Shakespeare: La tragedio de "Reĝo Lear".*
FE 1966:aprilo-majo, (237), p. 29.
Foote, A. D.: *La tragedio de Reĝo Lear.*
TBE 1966:majo, (753), p. 354-355.
Gregor, D. B.: *Kvinjamboj plenaj de muziko.*
HdE 1966:5, (1414), p. 4.
Su, A.: *Pri la neologismo en la poezia lingvo.*
□ HdE 1966:septembro 20, p. 4.
Zaletov, G.: *El alia vidpunkto.* (Rimarkoj al la recenzo de D. B. Gregor).
HdE 1966:16, (1425), p. 4.
Gregor, D. B.: *Miskompreno.* (Reago al la rimarkoj de G. Zaletov).
HdE 1967:1, (1428), p. 4.
Berger, J. F.: *Impona verko kaj traduko.*
□ GER 1966:majo, p. 58.
F. S(zilágyi), F.: *Tragedia superlativo.*
NP 1966:2, p. 123-124.
Hoog, H. A.: *William Shakespeare: Reĝo Lear.*
Dia Regno 1966, novembro, p. 1100.
Ahlrén, A.: *La tragedio de Reĝo Lear.*
LE 1966:11-12, p. 86.
Tonkin, H.: *Reĝo Lear kaj la universaleco de Shakespeare.* (Prelego en ISU. Londono, 1971).
HV 1976:1, p. 14-15; daŭrigo:1976:2, p. 22-25.

8.15.1.0 Notoj kaj referencoj

KUN SIAPECA... p. 179-180. Schwartz, R.
TBE 1972:januaro, (778), p. 159-160. Auld, W.
HdE 1973:3, (1538), p. 3. (Ĉerpitaj indikoj el Aŭstralia Esperantisto, ankaŭ eraraj).
KAJ LA CETER' p. 29-30. Waringhien, G.
BI 1984:1, p. 8. G. Mihalkov.
IF 1989:2, p. 43-49. *La Prefikso...* Vatré, H.
En la 1-a vol. p. 43, 76, 93, 129.
Ĉi-libre p. 1, 72.



8.16 William Shakespeare:

SOMERMEZNOKTA SONĜO
Komedio.
Belartaj Kajeroj n-ro 31.

El la angla tradukis K. Kalocsay.

La Laguna: J. Régulo, 1967.
14 x 12 cm, 100 p. Broŝ.

A MIDSUMMER NIGHT'S DREAM

Ĉi tiu teatraĵo apartenas al la unuaj verkoj de Shakaspeare. Tamen, ĝi ĉiam estis inter la plej popularaj verkoj de la granda angla dramisto. En la SONĜO neniu estas murdita aŭ mortigita. En ĉi tiu komedio Shakespeare unuafoje roligas heroojn el la mondo de la fantazio. Krom ĉi tiu teatraĵo, Shakespeare nur en LA TEMPESTO roligas feojn, kiel movigantojn de okazintaĵoj.

La kerno de la komika dramo estas la konfuziĝo de la geamantoj, kiuj – pro magio – enamiĝas al nekonvenajn personojn. Ekzemple la reĝino de feoj, Titania enamiĝas al Bobeno, kiun la petolema Pukk (koboldo) provizis per kap' azena. Jen la amkonfeso de Titania:

Rekantu, dolĉa mortalul' mi petas.
Al via kant' oreloj enamiĝis,
okulojn miajn via form' sklavigas,
unuavide la potenco granda
de via belo movas min perforte,
ke mian amon diru mi ĵurvorte.

Bobeno-azeno el tiu amkonfeso tiras la konkludon:

Miakrede, sinjorino, malmulte de racio troviĝas en tio, sed, verdire, racio kaj amo ne tre kompanias nuntempe.

La magio trafas ankaŭ la surterajn gejunulojn, ĉefrolantojn de la *Komedio.* Antaŭ la sorĉo Helena, enamiĝanta al Demetrio, sed li amas Hermian. Hermia amas Lisandron, sed tiu ne reciprokas la amon de Hermia. Post la sorĉa sonĝo – per la petolo aŭ eraro de Pukk – okazas "amtranskapiĝo", sed fine la *Komedio* finiĝas per la nupto de tri feliĉaj, bonordaj paroj kaj la nuptobenoj de la feoj.

*

Post la apero de REĜO LEAR esperantigita de Kalocsay, apenaŭ forpasis unu jaro kaj la Esperanta publiko povis enmanigi lian novan tradukon de Shakespeare. En la *Postparolo* de Kalocsay dediĉis kelkajn liniojn al la pri frua SONĜO-traduko fare de Louise Briggs en 1921.

"Se konsideri la tiaman staton de la poezia lingvo – skribis Kalocsay – *la traduko estas surprize bona... La nuna lingvo ebligas ankaŭ pli da vervo por redoni la ŝekspiran diradon, la 'dikcion'..."*

Certe ankaŭ tio estis la motivo de Kalocsay retraduki la ĉarman komedion.

Oni ne povas dubi, ke krom la intertempa lingvoevoluo, ankaŭ la poeta talento de la tradukisto kontribuis al la sukcesa retradukaĵo. Kalocsay multloke redonis rimojn, kiujn Briggs ellasis. La nomoj de la metiistoj estas karektarizaj pri sia metio, ekz. *Bobeno, Fluto, Raboto* ktp. Kvankam Kalocsay bezonis pli da versoj ol Shakespeare, tamen la traduko bone akompanas la originalon.

La kvarpaĝa *Postparolo* de sceno al sceno klarigas la tekston ne facile komprenebla por la nuntempa leganto. En la *Glosaro* estas troveblaj 42 vortoj ne registritaj en la PLENA VORTARO kaj ties SUPLEMENTO.

Oszkár PRINCZ

*

8.16.1. Esenca bibliografio

E. H.: *Somermeznokta Sonĝo.*
Dana Esperanta Bulteno 1969:2, p. 18-19.
Aaerse, S.: *Majstra traduko.*
HdE 1969:1, (1464), p. 3; alparolo de J. F. Quirke en: HdE 1969:6, (1469), p. 3.
Gregor, D. B.: *Somermeznokta Sonĝo.*
TBE 1969:febr. (752), p. 41-42.
Pontedora, C.: *Somermeznokta Sonĝo.*
L' Esperanto 1969:3, p. 29.
S. A.: *Somermeznokta Sonĝo.*
Sennaciulo 1969:2, (765), p. 20.
Nakamura, t.: *La plej alloga verko de Shakespeare.*
Esperanto 1969/66.
Mora, G.: *William Shakespeare: Somermeznokta Sonĝo.*
Boletín 1969:marto-aprilo, (172), p. 18-19.
Benczik, V.: *Somermeznokta Sonĝo.*
HE 1969:5, p. 15.
Sproeck, A.: *Eleganta traduko.*
GER 1969:5, p. 53.
Ahlren, A.: *Ĝua legaĵo.*
LE 1969:5-6, p. 36-37.
Waringhien, G.: *La verko kaj la traduko.*
HV 1969:3, p. 22.
Kock, E. de: *Pri kaj cirkaŭ brila traduko.*
NP 1970:1, p. 56-63; Alparolo de I. Dratwer en: HdE 1972:8, (1525), p. 4.
Tonkin, H.: *Kalmanaj metiistoj el Ateno.*
LF 1973:17-18, p. 9-12.

8.16.1.0 Notoj kaj referencoj

HE 1968:11, p. 7-8. A. Csiszár.
TBE 1972:januaro, (778), p. 160. W. Auld.
IF 1989:2, p. 43-49. *La Prefikso...* Vatré, H.
En la 1-a vol. p. 44, 93.
Ĉi-libre p.

8.17 KANTOJ KAJ ROMANCOJ(90)
Elektitaj poemoj de Heinrich Heine.

El la germana tradukis:
K. Kalocsay kaj G. Waringhien.

Kovrilo de J. Schaap.
Belliteratura serio 27-28.

La Laguna: J. Régulo 1969.
22 x 16 cm, 381 p.

"Heine estis, ekde la fruaj tempoj de la lingvo, la poeto plej favorata de la esperantistoj-verstradukantoj; tion klarigas, interalie, la ŝajna facileco kaj mallongeco de liaj poemoj..." – skribas la tradukantoj en la volumo.

Vere, jam en la UNUA LIBRO troviĝas Heine-poemo el la *Lirika Intermezo*, kiu kun du aliaj Zamenhof-tradukoj eniris ankaŭ en la FUNDAMENTA KRESTOMATIO-n kune kun la transplantoj de L. Belmont, A. Kofman, F. Kanaloŝŝy-Lefler kaj E. de Wahl. F. Pillath (sub la pseŭdonimo Zanoni) publikigis en 1925 la plenan tradukon de Atta Troll kune kun la *Antaŭparolo* de Heine:

"...tiuj antaŭaĵoj estis tro malmultaj kaj tro unuflanke elektitaj (ofte la sama peco estis re- kaj retradukita), por doni ĝustan ideon pri la Heine-a poezio; krome la tradukistoj ankoraŭ ne disponis pri sufiĉe riĉa kaj fleksebla lingvo por rivali kun la arto de tia rafinita genio...") – motivas sian entreprenon la tradukantoj.

Malgraŭ, ke Heine ne havis senpere interrilaton kun Hungario, lia liriko multe efikis al la tiutempa hungara literaturo. La longan vicon de la tradukistoj malfermis la alia poeto-giganto de la sama epoko: Sándor Petőfi per la traduko de *Kronado*. La Heine-kulto en Hungario ne limiĝis al la teritorio loĝata de germana minoritato. La hungara traduk-literaturo de Heine estas relative abunda.

Estas memkompreneble, ke lia liriko tuŝis ankaŭ la koron de Kalocsay, kiu povis ĝui la versojn en originalo. Lia unua Heine-tradukaĵo *Mi ploris dum la dormo* aperis en *Literatura Mondo* (1922/18). En lia transplanto jam ses Heine-poemoj troviĝas en ETERNA BUKEDO (1931). Pri liaj pliaj tradukoj informas nin letero de G. Waringhien (mankas dato):

"Mi tre ĝojas ekscii, ke dum viaj hospitalaj kuŝoj la Muzo ne timis kunkuŝi kun vi. Via fekundo mirigas kaj admirigas min. Mi skribis al Pérez pri viaj Heine tradukoj, kiuj estas perfektaj. Estus interese, se ni povus trovi eldonanton por la datreveno de Heine-a morto, kaj eble eldoni la "romancojn", kiujn mi tradukis en LM, du-tri aliajn mi havas en tirkesto...".

Kaj la talenta Duo senlace laboris super la esperantigo de Heine-versoj. Ili reciproke kontrolis ĉiujn novajn tradukojn kaj instigis unu la alian por pliaj atakoj de la poemoj. En 1957 Kalocsay skribis al Waringhien:

"Mi tradukis novajn pecojn el Heine, tiel, ke nun el la Lirika Intermezo, Hejmenreveno kaj Nova Printempo estas tradukita ĝuste la duono de la kanzonoj. Sume nun estas tradukitaj preskaŭ 5000 versoj, kaj el ili vi tradukis iom pli ol 1000 versojn, via kontribuo do tute ne estas malgrava, precipe se vi tradukos ankoraŭ kelkajn ĉapitrojn el Germanio....".

Kaj ili senlace daŭrigis la laboron.

Waringhien en 1961 sugestis al Régulo, ke okaze de 70-a naskiĝtago de Kalocsay, li anoncu la eldonon de la Heine-volumo.

La plano dank' al la klopodo de Régulo realiĝis. Kalocsay en novembro 1970 kvitancis la alsenditan Heine-volumon:

"... Fakte, la Heine-libro estas laŭdeginde bela, mi preskaŭ diris, ke ĝi estas tro valora por nia esp-ista publiko, malsana je bibliofobio."

*

La poemkolekton enkondukas abunda kunmetaĵo pri la historia periodo, en kiu vivis kaj verkis Heine. Tiuj *Paralelaĵoj* kun la *Bibliografiaj notoj* multe helpas la komprenon de la poeziaĵo de Heine.

La poemoj estas elektitaj el la *Libro de l' kantoj, Novaj poemoj, Germanio, Vintra fabelo, Atta Troll, Versoj aktualaj, Romancero* kaj *Lamentadoj.* Do ne temas pri kompleta kolekto. La tradukantoj elektadis tiel, ke – apud la popularaj, muzikigitaj kantoj kaj plej konataj poemoj – ili prezentu la poeziaĵon de Heine el ĉiu vivoperiodo. La traduklaboro dividiĝis jene: Kalocsay tradukis la *Libron de l' kantoj, Novajn poemojn, Atta Troll, Versojn aktualajn* kaj *Lamentadojn.* La kontribuo de Waringhien: poemoj el *Germanio, Vintra fabelo* kaj *Romancero.* Tamen tiu divido signas la ĉeftradukanton de la ciklo, ĉar Waringhien tradukis ankaŭ el la lirikaĵo kaj Kalocsay ankaŭ el la *Romancero.*

La problemojn de la traduko (versformo, aranĝo de la materialo ktp) antaŭparole skizas la tradukantoj:

"...La ĉefa malfacilo de traduko el Heine estas la simpleco oni povus diri: la nudeco de lia lingvo kaj stilo..."

Kompetentuloj konstatis, ke la genia duopo Kalocsay-Waringhien venkis la obstaklojn kaj fidele redonis la esencan karakteron de la poeziaĵo de Heine.

En la *Glosaro* estas listigitaj kaj la sencon klarigitaj 47 vortoj, kiuj ne estas troveblaj en la PLENA VORTARO kaj ties Suplemento (1953).
